

# The Project Gutenberg eBook of Makbeto, by William Shakespeare

This ebook is for the use of anyone anywhere in the United States and most other parts of the world at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this ebook or online at [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org). If you are not located in the United States, you'll have to check the laws of the country where you are located before using this eBook.

Title: Makbeto

Author: William Shakespeare  
Translator: D. H. Lambert

Release date: January 8, 2015 [EBook #47913]

Language: Esperanto

Credits: Produced by Andrew Sly, Brenda Lewis, Keith Edkins and the Online Distributed Proofreading Team at <http://www.pgdp.net>  
(This book was produced from scanned images of public domain material from the Google Print project.)

\*\*\* START OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK MAKBETO \*\*\*



SHAKESPEARE

# MAKBETO

Tradukita de

D. H. LAMBERT, B. A. (Oxford)

Fratulo de la Brita Esperantista Asocio  
Profesoro aprobita de la S. F. p. p. E.



PARIS

LIBREJO HACHETTE KAJ K<sup>io</sup>

79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79

1908

Tous droits réservés.

AL LA FRANCA ESPERANTISTARO

## ANTAŬPAROLO.

*El la kvar famekonataj tragedioj, «Hamleto» prezentas al ni la karakteron de homo, kontraŭbatalanta kontraŭ grava devo, por kies plenumo li sin sentas tro malforta, «Otelo» la terurajn rezultatojn de ĝeloza spirito, «Julio Cezaro» la funkciadon internan de nobla animo (tiu de Bruto), kiu sin dediĉas al la supermezura tasko de patrujamulo, alvokita al la restarigo de popolaj rajtoj: «Makbeto» tamen ekscitas nian simpatian al bravulo, ankaŭ patrujamulo, sed kiu, antaŭenpuŝata de sia edzino kaj de povoj supernaturaj, atingas la celon de sia ambicio per krimoj, spite la avertado de sia konscienco. La moralajo ne bezonas klarigon, kaj rememorigas al ni la Nemesison de la grandaj antikvaj grekaj dramoj, kiu ĉiam sekvas la postsignojn de malbonfarintoj. En neniu parto de nia nacia poeto sin trovas pli belaj frazaroj, pli brila imagado, pli profunda kono de la homa naturo.*

# MAKBETO

Dramo en kvin aktoj

## PERSONOJ

DUNKANO, reĝo de Skotlando.  
MALKOMO }  
DONALBENO } nobeloj de Skotlando.  
MAKBETO }  
BANKVO } nobeloj de Skotlando.  
MAKDUFO }  
LENOKSO }  
ROSSO }  
MENTETO } nobeloj de Skotlando.  
ANGUSO }  
KATNESO }

FLEANCO, filo de Bankvo.  
SIVARDO, grafo de Nordhumberlando,  
generalo de la angla militistaro.  
JUNA SIVARDO, filo de la grafo de  
Nordhumberlando.  
SETONO, oficiro el la sekvantaro de  
Makbeto.  
FILO DE MAKDUFO.  
ANGLA KURACISTO.  
SKOTA KURACISTO.  
SERĜENTO.  
PORDISTO.  
MALJUNULO.  
ŜIA GRAFINA MOŜTO MAKBETO.  
ŜIA GRAFINA MOŜTO MAKDUFO.  
SINJORINO el la sekvantaro de Ŝia Grafina  
Moŝto Makbeto.  
HEKATEO.  
TRI SORĈISTINOJ.  
Nobeloj, sinjoroj, oficiroj, soldatoj,  
mortigistoj, servistoj kaj sendatoj.  
La Spirito de Bankvo, kaj aliaj fantomoj.

*La agado havas lokon en Skotlando; escepte je la fino de la kvara akto, kiam ĝi havas lokon en Anglujo.*

# MAKBETO

## AKTO UNUA

### SCENO UNUA

**Vasta erikejo. Fulmotondras.**

Venas TRI SORĈISTINOJ.

UNUA SORĈISTINO.

Ĉu ni, dum la fulmo skuas

Kverkojn, kaj la tondro bruas,  
Nin revidos?

DUA SORĈISTINO.

Post movado  
Kaj batiĝ' de batalado.

TRIA SORĈISTINO.

Tiam nia reeliro  
Estos antaŭ sunsubiro.

UNUA SORĈISTINO.

Kie?

DUA SORĈISTINO.

Sur la erikejo.

TRIA SORĈISTINO.

Kun Makbet' la renkontejo.

UNUA SORĈISTINO.

Venas mi, ho katspirito!

DUA SORĈISTINO.

Bufspirito vokas min. Baldaŭ, baldaŭ!

ĈIUJ.

La malbela estas bela  
Al ni, kaj la bel' malbela.  
Flugu ni tra la aero,  
L' abomena atmosfero.

Sorĉistinoj malaperas.

SCENO DUA

### **Tendaro apud Foreso.**

Trumpetado post la scenejo. Venas la reĝo DUNKANO, MALKOMO, DONALBENO, LENOKSO, kun sia sekvantaro. Ili renkontas vunditan serĝenton.

DUNKANO.

Ho, kiu estas tiu sangkovrito?  
Li ŝajne povos doni la plej novan  
Rakonton pri l' ribelo.

MALKOMO.

Tiu estas  
Serĝento, kiu kun bravec' batalis,  
Por ke mi ne kaptiĝu per la manoj  
De malamikoj.

Mi salutas vin,  
Vi kuraĝulo, mia kamarado.  
Klarigu al la reĝo, kiel staris  
L' afero, kiam vi forlasis ĝin.

SERĜENTO.

La rezultato ŝajnis same duba,  
Ol kiam forta paro da naĝantoj,  
Plektitaj kune per la lacaj brakoj,  
Malhelpas la ekzercon de l' naĝarto.  
La senkompata Makdonaldo (inda

Je l' nom' de ribelanto, ĉar spiriton  
Li havas la malbonan de l' diablo)  
Aregon amasigis konfuzitan  
El sia okcidenta insularo,  
Kaj per la helpo de ŝanĝema sorto  
La malbenito jam sukcesis.—Tamen  
Makbeto,—kiu plene la titolon  
Meritas de heroo,—glav' en mano,  
Jam sangkolora pro senĉesaj agoj  
De batalad', bravulo sen komparo  
Eltranĉis vojon inter batalantoj,  
Ĝis Makdonaldon li, vizaĝo kontraŭ  
Vizaĝo, ekatakis, kaj rapide  
Li senceremonie lian kapon,  
Laŭ du duonoj distranĉitan, fiksas  
Sur la remparojn de kastelo nia.

DUNKANO.

Ho kuraĝulo, mia brava kuzo!

SERĜENTO.

Kiel ŝippereigaj fulmotondroj  
Naskiĝas en kvieta regiono,  
En kiu la ĝojiga suno brilas,  
Tiel de l' fonto mem de la feliĉo  
Aperis malfeliĉo:—reĝo nobla,  
Apenaŭ la justec' la insulanojn  
Devigis kuri, kiam jen la reĝo  
De Norveguj' l' okazon profitante,  
Kun bataliloj nove poluritaj,  
Kaj fortaj kaj senlacaj soldataroj  
Komencis nin ataki.

DUNKANO.

Ĉu ne tio  
Timigis Bankvon kaj Makbeton?

SERĜENTO.

Vere,  
Sammaniere kiel la paseroj  
Timigas aglojn, la lepor' leonon!  
Por al vi doni la rakonton veran:  
Kun la fortego de l' Vulkan' forĝanta,  
Je l' malamikoj ili martelumis,  
Kvazaŭ banontaj sin en ruĝa sango,  
Kaj konstruontaj domon el kranioj;  
Sed mi ne scias—mi svenema estas—  
Alportu kuracilojn por la vundoj.

DUNKANO.

Paroloj viaj kaj la vundoj vin  
Honorindigas. Ho! la kuracistojn  
Venigu!

Eniras Rosso.

Sed kiu venas?

MALKOMO.

L' inda Graf' de Rosso.

LENOKSO.

Mieno lia montras maltrankvilon,  
Kvazaŭ strangajojn li rakontos.

ROSSO.

Dio

La reĝon gardu!

DUNKANO.

Nobla graf', de kie  
Vi venas?

ROSSO.

De Fiflando, alta reĝo.  
Kie fiere flirtas la standardoj  
Norvegaj, insultante la landanojn  
Per la malvarma ventumado sia.  
La reĝo mem kun granda soldataro,  
Helpate de senhonta perfidulo,  
Graf' de Kordor', komencis la batalon,  
Ĝis, kvazaŭ sub la ŝildo de Belono,  
Makbeto kontraŭstaris lian forton,  
Kaj, en armaĝ' de l' kapo ĝis piedoj,  
Al glav' de l' ribelanto sian glavon  
Kuraĝe prezentante, fine restis  
Venkinto.

DUNKANO.

Senmezure mi gratulas.

ROSSO.

Nun Sveno, reĝo de la Norvegujo,  
Proponas la ĉesigon de l' batalo,  
Por enterigi siajn mortigitojn;  
Sed ni konsentis nur kondiĉe, ke  
Li el la reĝa kest' dek mil dolarojn  
Elspezu, por profito de la ŝtato.

DUNKANO.

Neniam plu la grafo de Kordoro  
Malbonon faros kontraŭ nia lando;  
Proklamu, ke li tuj ekzekutadon  
Suferos, kaj Makbeto anstataŭos  
Lin pri titolo kaj pri havo liaj.

ROSSO.

Ordonoj viaj baldaŭ plenumiĝos.

DUNKANO.

Makbet' rekompencinda nun posedos  
De li perditajn juste la honorojn.

Ĉiuj foriras.

SCENO TRIA

**Erikejo. Tondro bruas.**

Venas la TRI SORĈISTINOJ.

UNUA SORĈISTINO.

Kien vi iris, fratino?

DUA SORĈISTINO.

Por mortigi porkojn.

TRIA SORĈISTINO.

Fratino, kien vi?

UNUA SORĈISTINO.

Maristedzino havis sur genuoj  
Kaŝtanojn, manĝadante, manĝadante.  
«Ho, al mi donu» diris mi. «Foriru»,  
Senhonte la malbelulino kriis!  
Foriris ŝia edzo al Alepo,  
Ŝipestro de la Tigro:  
Sed ha! sen velo aŭ remilo,  
Travojaĝante en kribrilo,  
Mi venĝos min al ŝi.

DUA SORĈISTINO.

Mi al vi donos fortan venton.

UNUA SORĈISTINO.

Koran dankon kaj konsenton.

TRIA SORĈISTINO.

Duan venton donos mi.

UNUA SORĈISTINO.

Mi da ventoj havas pli,  
Kaj de ĉiu ĉielparto  
Mi alportos, per sorĉarto,  
La blovegona kiel vipon  
Por batadi lian ŝipon.  
Ĉiunokte vekiĝema,  
Li fariĝos malgrasema,  
Ĉar la iompostioma  
Velko estos superhoma;  
Kvankam li la vivon savos,  
Li la ŝippereon havos.  
Jen vidu!

DUA SORĈISTINO.

Montru, montru.

UNUA SORĈISTINO.

Dikan fingron de piloto,  
Kiu estis dronigoto!

Tamburado post la sceno.

TRIA SORĈISTINO.

Aŭdu, kia tamburado!  
De Makbeto la parado.

Ili dancas ĉirkaŭ la kaldrono.

ĈIUJ.

Ĉiuloken kurieroj  
Tra la maroj kaj la teroj,  
Man' en mano, tri knabinoj,  
Ni rondiras sortulinoj.  
Fojojn tri por vi, knabino,  
Tri por ĉiu sorĉistino,  
Ĉar, vi scias, trio tria  
Estas laŭ regulo nia.

Venas Makbeto kaj Bankvo.

MAKBETO.

Taghorojn tiel belajn, en malbelajn  
Ŝanĝitajn, jam neniam mi memoras.

BANKVO.

Kiom da mejloj ĝis Foreso?—Kiu  
Ĉi tiuj estas, kun vizaĝoj palaj  
Kaj strangaj vestoj; kvazaŭ ili estus  
Ne terloĝantoj, tamen staras sur

La tero? Ĉu vi vivas? Ĉu al vi  
Demandojn fari ni nun povas? Ŝajne  
Vi donas signojn de prudento homa,  
Tuŝante ĉiu la malgrasajn lipojn  
Per la maldika fingro:—Vi virinojn  
Similas, sed la barboj min kredigas,  
Ke vi ne estas tiaj.

MAKBETO.

Se eble diru, kiuj estas vi?

UNUA SORĈISTINO.

Makbet', salutojn, grafo de Glamiso!

DUA SORĈISTINO.

Makbet', salutojn, grafo de Kordoro!

TRIA SORĈISTINO.

Makbet', salutojn, la estonta reĝo!

BANKVO.

Sinjoro, kial tremas vi pro timo  
De profetaĵoj tiel feliĉigaj?  
Ĉu vi fantaziaĵoj de l' imago  
Nur estas, aŭ en vero tio, kio  
Vi ŝajnas esti? Vi salutas mian  
Kunulon, lin ĝentile gratulante  
Pri nuna la favor', kun antaŭdiroj  
Pri nobeliĝ' estonta, kaj esperoj  
Eĉ pri reĝeco de li atingebla,  
Igantaj lin distrita esti: vi  
Al mi nenion diras. Se vi havas  
La antaŭscion pri la estonteco,  
Do tion, kion sort' mistera naskos,  
Al mi sciigu, kiu nek petegas  
Favorojn, nek minacojn viajn timas.

UNUA SORĈISTINO.

Salutojn!

DUA SORĈISTINO.

Salutojn!

TRIA SORĈISTINO.

Salutojn!

UNUA SORĈISTINO.

Pli malgranda ol Makbeto,  
Kaj pli granda.

DUA SORĈISTINO.

Malfeliĉa,  
Tamen ol li pli feliĉa.

TRIA SORĈISTINO.

Vi, ne reĝo, reĝojn naskos.  
Do Makbet' kaj Bankv', salutojn!

UNUA SORĈISTINO.

Bankvo kaj Makbet', salutojn!

MAKBETO.

Parolintinoj pri sekretoj, haltu;

Klarigu; pro la morto de Sinelo  
Mi nepre estas grafo de Glamiso,  
Sed kiel de Kordoro? De Kordoro  
La grafo vivas en prospero plena,  
Kaj, ke mi reĝ' fariĝos, nekredinde  
Estas egale kun la lasta diro.  
Klarigu do, de kie vi ricevis  
Novaĵon tiel strangan? kaj por kio  
Sur tiu ĉi dezerta erikejo  
Vi nin haltigas por proklamoj tiaj.  
Parolu, mi ordonas.

La sorĉistinoj malaperas.

BANKVO.

La tero, same kiel l' akvo, havas  
Vezikojn; ili estas samaspecaj.  
Sed kien ili neniigis?

MAKBETO.

En

L' aeron ĉio tio, kio ŝajnis  
Korphava, fluidiĝis, same kiel  
Vaporo en la venton. Se nur ili  
Ĉi tie restus!

BANKVO.

Ĉu en vero antaŭ

Okuloj niaj ili sin prezentis,  
Aŭ ĉu ni manĝis tiun frenezigan  
Radikon, kiu la prudenton homan  
Dormigas?

MAKBETO.

Infanoj viaj estos reĝoj.

BANKVO.

Vi

Mem reĝo estos.

MAKBETO.

Ankaŭ grafo de

Kordoro, ĉu ne vere?

BANKVO.

Jes, precize

Laŭ tiu melodio. Kiu venas?

Venas Rosso kaj Anguso.

ROSSO.

La reĝo ĝoje aŭdis la rakonton,  
Makbet', pri la sukceso via, kaj  
Sciinte, kiel vi la vivon riskis,  
Kontraŭstarante la ribelantaron,  
Ŝanceliĝante inter la deziro  
Sufiĉe vin laŭdadi, kaj l' admiro  
Al tiaj heroaĵoj, li silentis:  
Kaj poste inter la norvegaj vicoj  
Li trovas vin senlace batalantan,  
Netimigitan per terura morto,  
Al kiu vi aliajn sendis.  
Kaj kiel dum la vintra nordblovego  
Hajlero post hajlero falas teren,  
Tiele kurier' post kuriero  
Konfirmis la novaĵon, laŭdegante  
Al nia reĝo la konduton vian  
En la defendo de reĝregno lia.



ANGUSO.

Ni venas por saluti vin dankeme  
De lia reĝa moŝto:  
Heroldoj kvazaŭ, por vin alkonduki  
Al li ni mem, ne por vin rekompenci.

ROSSO.

Kaj, kiel garantio de honoro  
Pli granda, kiu sekvos, li ordonis  
Ke mi vin nomu grafo de Kordoro:  
Per kiu do titolo nun tutkore  
Mi vin salutas, nobla grafo, ĉar  
Ĝi estas via.

BANKVO.

Kion! Ĉu paroli  
Al ni la veron la diablo povas?

MAKBETO.

La grafo de Kordoro vivas: kial  
Vi vestas min per roboj ne la miaj?

ANGUSO.

Jes, tiu, kiu ĝis nun estis grafo,  
Ankoraŭ vivas, kondamnito tamen  
Laŭ la verdikto justa de la reĝo.  
Ĉu kun la Norvegaro li kuniĝis,  
Aŭ per sekreta help' la ribelantojn  
Subtenis, aŭ kun ambaŭ kunlaboris,  
Por ruinigo de patrujo sia,  
Ne scias mi: sed perfidaĵoj kontraŭ  
La reĝaland' pruvitaj, kaj de li  
Eĉ konfesitaj, lin detruis.

MAKBETO.

(Flanken.) Ha!  
Glamiso mi, kaj grafo de Kordoro:  
Venonta tamen estas la plej granda.  
(Al Rosso kaj Anguso.) Por via ĝentileco korajn  
dankojn.  
Ĉu vi ne preĝas, ke infanoj viaj  
(Al Bankvo.) Regnestroj estu, kiam tiuj, kiuj  
Min nomis grafo de Kordor', promesis,  
Ke ili seĝon honorindan havos?

BANKVO.

Se vi al tiu diro volus fidi,  
Vi povus kredi eĉ, ke la reĝeco  
Al vi, Kordoro, estas atingebla.  
Mirinde tamen estas, ĉar tre ofte  
Por malbonigi la animojn niajn  
L' inferaj potenculoj veron diras,  
Kaj en aferoj bonaj niajn korojn  
Per malgrandaĵoj gajnas, faligontaj  
Nin poste en aliaj, kiuj traktas  
Esperojn niajn pri ĉiela vivo,  
Por pereigi nin.

(Al Rosso kaj Anguso.)

Kun vi parolon, kuzoj.

MAKBETO.

(Flanken.) Du veraĵoj  
Diritaj estas, kvazaŭ la prologoj  
Al la majesta akto, kiu faros  
La prezentadon de la reĝa temo.  
(Al Rosso kaj Anguso.)  
Mi dankas vin. (Flanken.) Ĉi tiu instigado

Supernatura certe povas esti  
Nek bona, nek malbona;—la rezonoj  
Ĝin pruvas.—Se malbona, kial certan  
Ĝi faris jam promeson pri sukceso?—  
Mi estas grafo de Kordor';—se bona,  
Kial al sugestio cedi, kies  
Fantaziaj' terura rigidigas  
Hararon mian, kaj la koron igas  
Batadi nenature, malgraŭ ĝia  
Fikseco, kontraŭ miaj ripoj? Timo  
Estanta ŝajnas malpli konfuziga,  
Ol la imago pri estonta faro:  
L' ideo teruriga pri mortigo  
Animon mian tiel forte skuas,  
Ke la agado restas nur pensado,  
Kaj nur la estonteco sin prezentas  
Al la spirito mia.

BANKVO.

Ho kunuloj,  
Rigardu kiel nia kamarado  
Distrita estas.

MAKBETO.

(Flanken.) Se la sorto faros  
Min reĝo, sorto sen agado mia  
Min ankaŭ kronu.

BANKVO.

Vidu, li surmetas  
Honorajn novajn, kiel novajn vestojn,  
Al kiuj ni bezonas ĉiam tempon,  
Por kutimiĝi al ilia uzo.

MAKBETO.

(Flanken.) Okazu kio ajn, per homa forto  
Venkebla estas ĉio, krom la morto.

BANKVO.

Makbeto inda, ni deziron vian  
Atendas.

MAKBETO.

Mi pardonon vian petas,  
Sinjoroj, forgesaĵojn rememori  
Penante. Via daŭra afableco  
Sur mia koro, kvazaŭ sur registro,

(Al Bankvo.)

Skribita restas.—Iru ni al reĝo.—  
Pripensu la okazintaĵon; juste  
Ni, elkonsiderinte la aferon,  
Pri ĝi parolu kune nekaŝeme.

BANKVO.

Plezure.

MAKBETO.

(Al Bankvo.) Do sufiĉe. (Al ĉiuj.) Ni foriru.

Ĉiuj foriras.

SCENO KVARA

**Foreso. Salono en la palaco.**

Trumpetado. Venas DUNKANO, MALKOMO, DONALBENO, LENOKSO, kaj ilia sekvantaro.

DUNKANO.

Ĉu la ekzekutado de Kordoro  
Jam plenumiĝis? La komisiitoj  
Revenis?

MALKOMO.

Ne ankoraŭ, via Moŝto.  
Sed ĵus parolis mi kun ĉeestinto  
Ĉe lia morto, kiu al mi diris  
Ke siajn perfidaĵojn li konfesis  
Tre malkaŝeme, petis la pardonon  
De via reĝa moŝto, kaj spiriton  
Penteman montris: lia adiaŭo  
Al vivo lian vivon plej ornamis.  
La morton li renkontis tiel, kiel  
Volante la trezoron plej valoran  
Forlasi, kvazaŭ nur senutilaĵon.

DUNKANO.

Neeble estas el vizaĝo homa  
Diveni, kion lia kor' pripensas.  
Al li mi vere estus konfidinta  
La tutan mondon.

Venas Makbeto, Bankvo, Rosso, kaj Anguso.

Kuzo plej fidinda.

La sento de maldankemeco mia  
Min malĝojigis; ne egalvaloras  
Meriton vian mia rekompenco,—  
Se inter la pezil' kaj la pesilo  
Egalapezo restus! Sed en vero  
Ne elpagebla estas mia ŝuldo.

MAKBETO.

Deziro mia servi mian reĝon  
Meriton sian portas. Via moŝto  
Akceptu miajn devojn, kiuj celas  
Servadi vian tronon kaj infanojn,  
Nur plenumebajn per konstanta zorgo  
Protekti vian vivon kaj honoron.

DUNKANO.

Alproksimiĝu, brava militisto,  
Vi estas la plantaĵo mia, ĉiam  
Klopodos mi, ke vi kreskadu plene.  
Ho nobla Bankvo, ankaŭ meritinda  
Vi estas, kaj bonfamo via iru  
Tra l' mondo: do mi ĉirkaŭprenu vin,  
Kaj ĉe la koro tenu.

BANKVO.

Se mi tie  
Fariĝos fruktodona, la rikolton  
Akceptu, reĝo mia.

DUNKANO.

Kortuŝite  
Pro troo de ĝojeco, mi la larmojn  
De malĝojeco sentas: filoj, grafoj,  
Parencoj, kaj plej karaj, sciu ĉiuj  
Ke ni ordonas, ke reĝrajtojn niajn  
Malkomo nia fil' plejaĝa havu,  
Kaj lin ni nomas Princ' de Kumberlando,  
Kaj li ne nur titole honoriĝu.  
Sed nobeligosignojn, kvazaŭ astroj,  
Sur ĉiujn meritintojn mi lumigos.  
For, for, al Inverneso, kie ni  
Per plej intimaj sentoj kunaliĝos.

MAKBETO.

Mi mem fariĝos la antaŭiranto,—  
Por plezurigi la edzinon mian  
Pri la alven' de via reĝa Moŝto;—  
Do forpermeson petas.

DUNKANO.

Ĝis revido.

MAKBETO.

(Flanken.) La Princ' de Kumberlando! Tiu estos  
Nesuperebla malhelpaĵo, aŭ  
Mi povos supersalti ĝin, ĉar meze  
De vojo mia kuŝas ĝi. Vi steloj,  
Lumigu ne al miaj nigraj celoj:  
L' okulo ekdormeme palpebrumu,  
La man' dezirojn miajn elplenumu.

Foriras.

DUNKANO.

Jes, nobla Bankvo, li bravulo estas:  
Kaj liajn farojn laŭdi mi laciĝos  
Neniam, kvazaŭ ĝuus mi senĉesan  
Festenon. Ni rapidu por ĉeesti  
En lia domo, kien li antaŭe  
Foriris, por gasteme nin akcepti:  
Senegalulo estas li.

Tamburado. Ĉiuj foriras.

#### SCENO KVINA

### **Inverno. Ĉambro en la kastelo de Makbeto.**

Venas ŜIA GRAFINA MOŜTO MAKBETO, legante leteron.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

«Ili renkontis min dum la tago de mia sukceso; kaj per la rezultato mi konstatis, ke ili posedas scion supernaturan;—kiam mi deziregis fari pluajn demandojn, ili fariĝis aero, en kiu ili malaperis.—Dum mi staris distrite miregigita, alvenis senditoj de l' reĝo, kiuj min salutis «Grafo de Kordoro», per kiu titolo antaŭe la sortulinoj min salutis, antaŭdirinte la estontecon per, «Al vi salutojn, la estonta reĝo!» Ĉi tion mi kredis bone sciigi al vi, la plej kara partoprenantino en mia nobeliĝo, por ke vi kunĝoju kun mi, sciante bone la nobeligon promesitan. Tion atente pripensu, kaj adiaŭ.»

Glamis' vi estas, kaj Kordor', kaj estos...  
Laŭ la promeso. Mi malfidas tamen  
Naturon vian, kiu tro posedas  
Da homa bonkoreco, por sin turni  
Al tia senkompata entrepreno.  
Vi celas nobelecon; la gloramo  
Al vi ne mankas, sed la harditeco  
Per kiu la gloramo devos agi.  
La altajn celojn volas vi atingi  
Honeste, vi deziras la rikolton  
Maljuste akiritan ĝui, tamen  
Vi timas entrepreni la rimedojn,  
Per kiuj havo estas atingebla.  
Ĉi tien venu, ke mi la kuraĝon  
Al vi enspiru kaj per la pikilo  
De mia lang' incitu vin al ĉio,  
Per kio vi posedos l' aŭreolon  
De l' pov' supernatura de la sorto,  
Al vi, por la kronado, promesitan.

Venas servisto.

Pri kio vi alkuras?

SERVISTO.

Nia reĝo  
Hodiaŭ nokte tien ĉi alvenos.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Vi freneziĝas: ĉu ne via mastro  
Kun li sin trovas? kaj, se estus vere,  
Li min sciigus pri la pretigado.

SERVISTO.

Sed, al vi plaĉu, estas vere: venas  
La grafo; unu el kunuloj miaj  
Lin antaŭiras tiel rapidege,  
Ke li apenaŭ inter la spiregoj  
Novaĵon tiun povis al mi diri.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Prizorgu lin, senditon pri gravaĵoj.

Servisto foriras.

Raŭkvoĉa estas eĉ la korvo, kiu  
Proklamas la eniron de Dunkano  
Sub nian remparitan fortikaĵon.  
Alproksimiĝu, vi spiritoj, kiuj  
Direktas homajn pensojn, nun, mi petas,  
Malvirinigu, kaj plenigu min  
De l' kapo ĝis piedoj je kruela  
Senkompatec'! Densigu mian sangon,  
Vi baru ĉiujn eblajn alirejojn  
Al pento, tiel ke nenia sento  
Bedaŭra pri la celo teruriga  
Ŝancelu min, nek inter ĝi kaj ĝia  
Efiko estu iu ripoztempo!—  
Vizitu miajn mamojn, kaj la lakton  
En galon ŝanĝu, vi servantspiritoj  
Mortigaj, kie ajn vi, nevideblaj  
De la okuloj homaj, konspiradas,  
La belon por difekti en naturo.  
Nebula nokto, venu, en mantelo  
De la plej densa fumo de l' infero,  
Por ke armilo mia ne ekvidu  
La ŝiron per tranĉrando sia akra  
Faritan, nek la ĉieluloj, tra  
Mallumo rigardante, ekkriegu:  
«Ho, haltu, haltu!»

Venas Makbeto.

Jen vi honorinda  
Glamis'! Kordoro nobla! salutota  
Estonte per eĉ pli majesta nomo:  
Leteroj viaj igis min transpasi  
La nesciantan nunon, kaj mi sentas  
Ke l' estonteco jen ĉeestas.

MAKBETO.

Kara  
Edzin', hodiaŭ nia reĝo venas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Kaj kiam li foriros?

MAKBETO.

Li intencas  
Foriri morgaŭ.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ho, foriron lian  
Morgaŭa sun' neniam devas vidi!  
Vizaĝo via, mia Grafa moŝto,

Similas libron, kies sur folioj  
Strangaĵojn oni legas. Por pasigi  
La tempon enmaskigu la vizaĝon,  
Kaj faru la ŝajnigon de plezuro.  
Per via mano, lango kaj okulo  
La rolon ludu de la gastiganto:  
Mienon havu de senkulpa floro,  
Sed estu la vipero subkuŝanta.  
La gaston, kiu venas, ni regalu;  
Kaj dum ĉi tiu nokto vi konfidu  
Al mi l' aferojn, kiuj dum la tagoj  
Estontaj al ni donos la mastrecon,  
Jes, la superregecon en la lando.

MAKBETO.

Ni plue kunparolos.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ne, konstanta  
La sintenado estu, la koloro  
Ŝanĝita ĉiam montras malfortecon.  
Al mi la faron lasu.

Ili foriras.

SCENO SESA

### **Inverneso. Antaŭ la kastelo de Makbeto.**

Trumpetado kaj torĉoj. Venas DUNKANO, MALKOMO, DONALBENO, BANKVO, LENOKSO,  
MAKDUFO, ANGUSO, kaj ilia sekvantaro.

DUNKANO.

Kastelo tiu ĉi lokiĝis bone.  
L' aero kun varmeta dolĉa spiro  
La sentojn niajn ĉarme refreŝigas.

BANKVO.

Ĉi tiu vizitanto dum somero,  
Amanto de sanktejoj, la hirundo  
Konfirmas la impreson, ke ventetoj  
Ĉielaj amindumas la naturon  
Ĉi tie per spirado sia dolĉa:  
Ne estas bret', apogo, nek angulo,  
Sur kiu ĝi la neston ne konstruis,  
Lulilon kvazaŭ, kie la idaro  
Ripozas; mi observis ofte, kie  
Ĉi tiuj birdoj naskas kaj loĝadas,  
L' aero havas dolĉan bonodoron.

Venas Ŝia grafina Moŝto Makbeto.

DUNKANO.

Regalantino mia jen alvenas!  
La amo nia kontraŭ vi kaj viaj  
Bezonas dankon. Tiamaniere  
Vi petu Dion, ke li rekompencu  
Nin pro penadoj viaj, kiujn kaŭzis  
La amo nia.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Al vi nia servo,  
Se eĉ pli ol centfoje plenumita,  
Ne egaligus sin al la honoroj,  
Per kies pezo via reĝa Moŝto  
Nin ŝarĝas; pri la nunaj kaj antaŭaj  
Ni ĉiam restos viaj petantuloj  
Al la ĉielo.

DUNKANO.

Kie nun sin trovas  
La grafo de Kordoro? Ni lin sekvis  
Post la kalkanoj, por lin anstataŭi,  
Kiel la pretigonto, sed li rajdis  
Rapide, kaj intencoj liaj karaj  
Lin antaŭ ni alportis hejmen. Nobla  
Gastigantino, ni hodiaŭ nokte  
La gasto via estas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ni, servantoj  
De via Moŝto, metas la infanojn,  
Propraĵon, kaj nin mem en vian konton,  
Por ke, saldante ĝin dankeme, ni  
Redonu tion, kio estas via.

DUNKANO.

La manon donu; kaj min enkonduku  
Al mia gastiganto; ni lin amas  
Tre kare kaj al li komplezojn niajn  
Daŭrigos. Laŭ permes' afabla via.

Ili foriras.

SCENO SEPA

### **La kastelo de Makbeto.**

Trumpetado kaj torĉoj. Venas festenordiganto kaj kelkaj servantoj, portantaj pladojn kaj manĝilaron, kiuj trapasas la scenejon. Poste venas MAKBETO.

MAKBETO.

Se la faraĵo estas plenumebla,  
Ju pli farota baldaŭ, des pli bone.  
Se post la mortigad' nenio restus  
Timinda, kaj ni nur la rezultaton  
De l' ago plenumita povus ĝui,—  
Se, post ĉi tiu sola frapo, ni  
Rigardi povus kun okul' trankvila  
La estontecon de la homa vivo,  
Sen tim' kaj sen teruro ni atendus  
La vivon, kiu restas trans la tombo.  
Sed eĉ sur tiu ĉi terglob' ni trovas  
La punon pro Diaĵo ofendita,  
Kaj tiuj samaj iloj, kiujn homoj  
Pretigas kontraŭ siaj kunvivantoj,  
Deturnas ofte la tranĉrandojn kontraŭ  
La elpensintoj de malbonaj faroj.  
La vinon venenitan por aliaj  
Al ni justec' severa en pokalo  
Prezentas, por ke ĝin ni mem eltrinku.  
Al mi Dunkan' duoblamaniere  
Konfidi rajtas; ĉar unue mi  
Per sangligilo, kaj per sankta devo  
Al mia reĝo estas devigata  
La rolon ludi de amik' fidela;  
Mi, due, kiel lia gastiganto,  
La pordojn devus fermi, forte bari  
Kontraŭ la mortigonto, ne mediti  
Mi mem la morton lian; jen Dunkano  
Kun tia majesteco sian tronon  
Okupis, kaj la ŝarĝon de la reĝa  
Ofico tiel sen kulpeco portis,  
Ke liaj virtoj, kvazaŭ dianĝeloj,  
Sonigus tondrobuan trumpetadon,  
Mortigon lian kontraŭprotestante;  
Kaj la kompat' enmaskigite kvazaŭ

Infano dolĉa, aŭ la kerubaro  
Ĉiela, sur ĉevaloj nevideblaj  
Tra la aer' radjante, la malpian  
Faraĵon al la tuta mond' proklamus,  
Kaj mar' da larmoj ĉion subakvigus.  
Mi havas ne kuraĝon al l' afero,  
Nur efektive la gloramon, kaj  
Gloramo estas incitilo, kiu,  
Spronante ĝis tro alta monta pinto,  
Faligas homojn en profundegaĵon.

Venas Ŝia grafina Moŝto.

Ho, kio nova?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ĵus la vespermanĝon  
Li finis; kial vi de li eliris?

MAKBETO.

Ĉu li pri mi demandis?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Vi ne scias!

MAKBETO.

Ni ne antaŭeniru pri l' afero;  
Li alte min honoris; kaj de ĉiuj  
Reputacion oran mi akiris,  
Brilegon kies devus mi konservi,  
Ne lasi tiel baldaŭ makuliĝi.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ĉu vi tro multe da espero trinkis  
Hieraŭ, kaj post dormo vi vekigis,  
Resaniĝinta de l' esperdiboĉo,  
Pentema, palvizaĝa? De nuntempo  
Mi scios kiel taksi vian amon.  
Ĉu volas vi postmeti la kuraĝon  
Post la deziro? Ĉu vi do rezignas  
De vivo la plej noblan ornamaĵon,  
Malkuraĝul' laŭ via propra sento,  
Dirante, «volus mi, se mi kuraĝus»,  
Simile al la kato, kiu timis  
Pro piedmalsekiĝo kapti fiŝojn?

MAKBETO.

Mi petas vin, silentu: ĉion, kio  
De vir' farebla estas, kiel viro  
Mi farus; kiu fari pli kuraĝus  
Ne estas viro.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Tial, kia besto  
Instigis vin al tia entrepreno?  
Ĉar, kiam vi kuraĝis ĝin elfari,  
Vi estis viro; kaj ju pli vi ludus  
La rolon proponitan, des pli viro  
Vi estus. Nek la tempo nek la loko  
Konvenis tiam, kaj vi volis ambaŭ  
Eltrovi: ili nun tre decas, tamen  
Ilia konveneco vin timigas.  
Patrino mi la dolĉan senton konis,  
Donante al suĉanta infaneto  
Nutraĵon, dum ĝi ridetante kuŝis.  
Sed la mampinton mi el la sendentaj  
Dentkarnoj tirus, kaj al ĝi frakusus  
Sur ŝtonojn kapon, se mi tion estus  
Ĵurinta, kiel ĵuris vi pri l' faro.



MAKBETO.

Sed se ni malsukcesus.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Malsukcesus!

Firmigu tamen la kuraĝon vian,  
Kaj ni ne malsukcesos. Dum Dunkano  
Eldormos,—ĉar vojaĝo la laciga  
Allogos dormon al okuloj liaj—  
La du servistojn, kiuj staras garde,  
Per vino kaj festeno malsobrigos  
Mi tiel, ke memoro, la gardisto  
De l' cerbo, estos vere nura fumo,  
La domo, kie la prudento loĝas,  
Similos alĥemian miksilujon.  
Do kiam ili havos la spiritojn  
En malmodera dormo entrempitajn,  
Ho kion ni ne povos pri Dunkano  
Neprotektata fari? kaj la kulpon  
Aljuĝi al servistoj liaj, kiuj  
Respondos pri ĉi tiu granda krimo?

MAKBETO.

Nur virinfanojn nasku, ĉar spirito  
Sentima via devus sin enigi  
En virojn sole. Ĉu ne oni kredos,  
Post kiam ni ĉi tiujn dormemulojn  
Per sang' ŝmirintaj estos, kaj iliajn  
Ponardojn proprajn estos manuzintaj,  
Ke ili estas liaj mortigintoj?

ŜIA GRAFINO MOŜTO.

Aliamaniere kiu kredi  
Kuraĝos, kiam ni pri lia morto  
Nekonsoleblan bruan funebradon  
Elkrios?

MAKBETO.

Mi sentas nun animfortecon, ĉiun  
El miaj membroj al ĉi tiu faro  
Terure fortigante. For, la tempon  
Kun ŝajno de senzorga ĝoj' pasigu,  
Ridetoj kordoloron enmaskigu.

Ili foriras.

## AKTO DUA

### SCENO UNUA

#### **Inverneso. Korto de la kastelo de Makbeto.**

Venas BANKVO, kaj FLEANCO, portante antaŭ li torĉon.

BANKVO.

Kioma horo, knabo?

FLEANCO.

La luno jam subiris: sed horbaton  
Mi ne ankoraŭ aŭdis.

BANKVO.

Lunsubiro  
Okazas je l' dek-dua.

FLEANCO.

Pli malfrue,  
Mi kredas.

BANKVO.

Bone; prenu mian glavon.  
En la ĉielo regas mastrumado  
Ŝparema, ĉiuj lampoj estingiĝis.  
Ĉi tion ankaŭ prenu. Forta voĉo  
Alvokas min ripozi, sed mi sentas  
Min maldormema: bonaj potenculoj,  
Min gardu de l' abomenindaj pensoj  
Malbonigantaj min dum la dormado!

Eniras Makbeto, kaj Servisto kun torĉo.  
Al mi la glavon donu. Kiu venas?

MAKBETO.

Amiko.

BANKVO.

Ĉu vi ne enlitiĝis? Jam la reĝo  
Kusiĝis, tre plezurigita estis,  
Kaj al servistoj viaj malavare  
Disdonis el la reĝa kesto. Ankaŭ,  
Jen, per ĉi tiu diamanto vian  
Edzinon li salutas, ŝin nomante  
Gastigantino plej aminda, poste  
Li kontentege sin retiris.

MAKBETO.

Niaj  
Deziroj fari taŭga la akcepton  
Al lia reĝa moŝto iom mankis  
Pro malpreteco, difektanta nian  
Bonvolon.

BANKVO.

Ne, sufiĉas. Lastan nokton  
Al mi en sonĝo la tri sortulinoj  
Aperis: ili al vi diris veron.

MAKBETO.

Mi ilin ne pripensas: tamen, kiam  
Ni havos ian horon disponeblan,  
Pri tiu temo kun vi konsiliĝi  
Mi volus, se al vi agrable estas.

BANKVO.

Plezure.

MAKBETO.

Se mi povos vin enskribi  
Kun partianoj miaj, sen honoro  
Ne estos via helpo.

BANKVO.

Se honoron  
La mian mi konservos,—dum mi celas  
Ĝin plibriligi,—kaj senmakulite  
Neriproĉinda mian fidelecon  
Mi gardos ĉiam, mi konsilon vian  
Tre ĝoje partoprenos.

MAKBETO.

Bonan nokton.

BANKVO.

Mi dankas, kun deziro reciproka.

Bankvo kaj Fleanco foriras.

MAKBETO.

Mastrinon vian petu, ke tuj kiam  
Trinkaĵo mia estos preta, ŝi  
La sonorilon sonorigu. Iru liton.

Servisto foriras.

Ĉu mi ponardon vidas antaŭ mi,  
Kun la tenil' facile manprenebla?  
Mi vin ekkaptu: ne, mi vin maltrafis.  
Mi tamen povas vidi vin ankoraŭ.  
Ĉu vi videbla, netuŝebla, estas,  
Vidaĵ' fatala, aŭ nur fantazia  
Ponard', kreita de l' spirit' malsana?  
Mi vin ankoraŭ povas klare vidi  
Laŭ formo, same vera kaj palpebla  
Ol tiu, kiun jen mi elingigas.  
Vi min direktas laŭ la vojo, kie  
Mi estis vojaĝonta, tian ilon  
Uzonte.

Okuloj miaj estas aŭ mokindaj  
De la aliaj sentoj, aŭ valoras  
Ol ili pli: mi vin ankoraŭ vidas,  
Havantan la tenilon kaj tranĉrandon  
Per sangaj gutoj makulitajn, kiuj  
Antaŭe ne ĉeestis! Ne—nenio—  
Ĝi estas nur ĉi tiu entrepreno  
Sangama, kiu kreas teruraĵojn.  
Nun sur la tuta duonsfer' naturo  
Malviva ŝajnas, kaj malbonaj sonĝoj  
Malhelpas la interkurtenan dormon:  
Nun Hekateo siajn oferaĵojn  
Sorĉarte festas, kaj mortigo, kvazaŭ  
Fantom' sensanga, kun gardisto sia,  
La lupo, kies teruriga bleko  
Anoncas lin sekrete alpaŝantan,  
Simile al Tarkvino la sentama,  
Alproksimiĝas sian celon. Tero  
Senmova, ne aŭskultu miajn paŝojn,  
Pro timo, ke la ŝtonoj mem sciigu,  
Kien mi min kondukis, kaj la senton  
Sangrigidigan de la hor' forigu,  
Konvenan al la horo. Mi malsaĝe,  
Dum li ankoraŭ vivas, nur minacas:  
Malvarma spiro mia ne prezentas  
La pensojn, kiujn fajra cerbo sentas.

Oni sonorigas.

Mi iras laŭ la sonorilinvito:  
Ne aŭdu ĝin, Dunkano, muzikeron,  
Vokantan min ĉielon aŭ inferon.

Foriras.

SCENO DUA

**La sama loko.**

Venas ŜIA GRAFINA MOŜTO.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

La samo, kio ilin ebriigis,  
Min faris maltime; tio, kio  
Ekkvietigis ilin, min flamigis.  
Aŭskultu! La raŭkkrio de la gufo,

Profeto pri venontaj teruraĵoj.  
Nun li plenumas la fatalan agon.  
Tra malfermitaj pordoj la ronkado  
De la lakeoj, kiuj pro ebrio  
Malzorgas sian mastron, venas. Mi  
La forgesigan drogon en la glasojn  
Enverŝis, ĝis la mort' kaj la naturo  
Interdisputas inter si, pri kiu  
Venkonta estas.

MAKBETO.

(De post la scenejo.) Kiu venas? Kio!

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ho ve, mi timas, ke vekiĝis ili,  
Ke ĉio restos provo, sed ne faro.  
Aŭskultu! Mi pretigis la ponardojn;  
Li nepre ilin vidis. Se ne ŝajnus,  
Ke mi la trajtojn de la patro mia  
Rigardas, l' agon mi farinta estus.

Revenas Makbeto.

Ho edzo mia!

MAKBETO.

Mi la faron faris.  
Ĉu vi ne aŭdis bruon?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Nur la krion  
De l' strigo kaj kraketon de la grilo.  
Ĉu vi parolis?

MAKBETO.

Kiam?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Nun.

MAKBETO.

Dum mi  
Malsupreniris?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Jes.

MAKBETO.

Aŭskultu! kiu  
En ĉambro dua kuŝas?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Donalbeno.

MAKBETO.

Vidaĵo priplorinda! (Rigardante siajn manojn.)

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Malsaĝe vi ĝin nomas priplorinda.

MAKBETO.

En dormo unu ridis, la alia  
«Mortigo» kriis, vekiĝinte; tamen  
La preĝojn murmurante ili turnis  
Sin al ripozo.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Tie du kunloĝas.

MAKBETO.

La unu kriis «Dio benu nin,»  
«Amen» l' alia, kvazaŭ ili vidas  
Min, kiu kun sangmakulitaj manoj  
Iliajn voĉojn tremegantajn aŭdis.  
Sed mi ne povis «Amen» diri, kiam  
«Nin Dio benu» ili kriis.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ne  
Pripensu tiel la aferon.

MAKBETO.

Tamen,  
Kial ne povis mi respondi «Amen»?  
Mi plej bezonis benon, sed «Amen»  
En gorĝo sufokiĝis.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Vi ne devas  
Mediti tiamaniere, ĉar  
Pripenso tia frenezigos vin.

MAKBETO.

Mi kredis aŭdi voĉon, kiu kriis,  
«Ne dormu plu! Makbet' mortigis dormon,»  
Senkulpan dormon, la zorgforgesilo,  
La mort' de nia ĉiutaga vivo,  
Freŝiga bano al tro lacaj membroj,  
Balzam' saniga de l' spirit' vundita,  
Rimedo ordigita de Naturo  
Por anstataŭi la agadajn horojn,  
La ĉefnutrilo, kiu dum vivado  
Subtenas la homaron.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Kion diri  
Vi volas?

MAKBETO.

Ĝi kriadis, «Plu ne dormu,  
Glamis' mortigis dormon, do Kordoro  
Ne dormos plu; ne dormos plu Makbeto.»

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Sed kiu tiel kriis? Nobla Grafo,  
Animfortecon vian vi difektas,  
Dum vi rigardas preskaŭ frenezume  
La faron. Iru, kaj per manlavado  
Forigu l' abomenan kulpigilon.  
Pro kio vi reportis la ponardojn?  
Vi devus ilin tie lasi: for,  
La dormemulojn sange ŝmiru.

MAKBETO.

Mi  
Ne iros plu: mi timas eĉ la penson  
Pri mia faro; ĝin ankoraŭ vidi  
Mi ne kuraĝas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Al mi la ponardojn,

Ŝanceliĝulo, donu: la dormantoj  
Kaj la mortintoj estas ne timindaj:  
Nur la okulo de infan' rigardas  
Pentraĵon de diablo time. Se li  
Sangadas, mi makulos la lakeojn  
Por fari ŝajnon de ilia ago.

Ŝi foriras. Oni frapas ĉe la pordego.

MAKBETO.

De kie venas tiu ĉi frapado?  
Kaj kial ĉiu bruo min timigas?  
Jen vidu, kiaj manoj! Ĉu la tuta  
Neptuna Oceano elpurigos  
El mia man' la sangon? Ne, la mano  
La senmezuran vaston de l' mararo  
Sangkolorigus, aliformigante  
La verdon en la ruĝon.

Revenas Ŝia Grafina Moŝto.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Egale sangkolorajn kun la viaj  
Jen vidu miajn manojn, sed mi hontus,  
Se mia kor' la saman elrigardon  
Ol via portus. (Oni frapas ĉe l' pordego.)  
Mi frapadon aŭdas  
Ĉe l' suda enirejo: ni kuŝiĝu;  
Da akvo kelkaj gutoj nin purigos:  
Kiel facile do! kuraĝo via  
Forlasis vin. (Oni frapas ĉe l' pordego.) Aŭskultu! oni  
frapas;  
Do vian ĉambroveston tuj surmetu,  
Pro timo, ke okaze ni aperu  
Gemaldormuloj. Do rekonsciiĝu.

MAKBETO.

Ne, per rekonsciiĝo mi konscios  
La faron. (Oni frapadas.) Veku per la pordfrapado  
Dunkanon! Se nur tio estus ebla!

Ili foriras.

SCENO TRIA

**La sama loko.**

Pordfrapado post la scenejo. Venas PORDISTO.

PORDISTO.

Jen, kia frapado! Se iu estus pordisto de l' inferaj pordegoj, ne estus fino al lia klopodo por ŝlosi kaj malŝlosi. (Frapado denove. Li parolas kvazaŭ li estus pordisto de l' inferaj pordegoj.) Frapu, frapu, frapu! Kiu estas, je l' nomo de la diablo? Jen farmamastro, kiu estas memmortiginto, antaŭtiminte tro da fruktoj: Venu frue: alportu sufiĉe da viŝiloj: ĉar, tie ĉi, vi elŝvitos. (Oni frapas.) Frapu! frapu! Kiu estas, je l' nomo de la alia diablo? Vere, jen dusencaĵparolinto, kiu laŭvice povis ĵuri por aŭ kontraŭ tiu aŭ alia partio; kiu estis je nomo de Dio senmezura perfidulo, sed ne povis atingi ĉielon per dusencaĵparolado: Ho, eniru dusencaĵparolinto. (Frapado denove.) Frapu, frapu, frapu! Kiu estas? Jen angla tajloro, sendita ĉi tien, tial ĉar li ŝtelis specimenon de franca ŝtrumpo; eniru, tajloro; tie ĉi vi povos hejti vian gladilon. (Frapado denove.) Frapu, frapu; neniam trankvilo! Kia vi estas? Sed tiu ĉi loko estas tro malvarma por la infero. Mi ne volas ludi plu la rolon de diablardisto: Mi intencis enlasi kelkajn el ĉiuj profesioj, kiuj vojaĝas sur florkovrita vojo al la eterna fajrego. (Frapado denove.) Baldaŭ, baldaŭ! Rekompencu la pordiston, mi petas. (Malfermas la pordegon.)

Venas Makdufo kaj Lenokso.

MAKDUFO.

Ĉu vi hieraŭ tiom malfruiĝis,  
Ke vi ne levis vin je l' matenruĝo?

PORDISTO.

Ni ja festiĝis ĝis la kokkantado,  
Kaj la drinkado estas incitilo  
Al tri aferoj.

MAKDUFO.

Al kiuj tri?

PORDISTO.

Je mia honoro, al nazkolorigado, dormado, kaj urinado. Sentamon ĝi ekscitas kaj malekscitas; ĝi ekscitas la amdeziron, sed forigas la funkciadon; do, pri multa drinkado oni povas diri, ke ĝi estas dusencaĵparolilo al la sentamulo. Ĝi faras lin, kaj malfaras lin; ĝi instigas lin, kaj malinstigas lin; igas lin alproksimiĝi kaj malproksimiĝi; fine trompas lin per dormo, kaj, kulpiginte lin, ke li ne veran vorton diras, lin forlasas.

MAKDUFO.

Mi ja kredas, ke drinkado trompis vin per dormo kaj faris vin mensogulo hieraŭ nokte.

PORDISTO.

Tion ĝi faris, sinjoro; sed mi punrekompencis ĝin pro ĝia perfido, kaj estante, mi kredas, pli forta ol ĝi, mi sukcesis ĝin terenĵeti.

MAKDUFO.

Ĉu via mastro nun leviĝas?

Venas Makbeto.

Frapado nia vekis lin; rigardu.

LENOKSO.

Al via Moŝto bonan tagon.

MAKBETO.

Ankaŭ

Al ambaŭ bonan tagon.

MAKDUFO.

Ĉu la reĝo

Leviĝas, nobla grafo?

MAKBETO.

Ne ankoraŭ.

MAKDUFO.

Li min ordonis frue lin viziti:  
Sed mi la horon preskaŭ preterlasis.

MAKBETO.

Mi vin al li konduku.

MAKDUFO.

Tio ĉi,

Mi scias, al vi estas plezuriga.

MAKBETO.

Laboro, kiu plaĉas, portas ĝojon.  
Jen lia ĉambro.

MAKDUFO.

Mi kuraĝas frapi,

Ĉar mia servo ĝin al mi permesas.

LENOKSO.

Ĉu ne la reĝo iros for hodiaŭ?

MAKBETO.

Sendube: tia estas lia volo.

LENOKSO.

Ventegoj reĝis lastan nokton; kie  
Ni loĝis kamenkapoj forbloviĝis,  
Kaj tra l' aer' aŭdiĝis plendoj, strangaj  
Ekkrioj de mortantoj, antaŭdiroj  
Pri ekrompiĝoj de interrilatoj  
Intimaj familiaj, ŝtatsanoj  
Konvenaj al la dolorigaj tempoj  
De la jarcent'; la mallumama birdo  
La tutan nokton bruis: kelkaj diras,  
Ke la terglobo, kvazaŭ februmanta,  
Ektremis.

MAKBETO.

Estis nokto malkvieta.

LENOKSO.

Junulo mi antaŭe ne memoras  
Similan nokton.

Revenas Makdufo.

MAKDUFO.

Abomenaĵ' terura, de la koro  
Ne imagebla, nek de l' lang' direbla!

MAKBETO kaj LENOKSO.

Kio okazis?

MAKDUFO.

Rigardu la ĉefverkon de detruo,  
Mortigo malpiega jen perforte  
Enmarŝis la sanktejon de l' Sinjoro,  
Kaj ŝtelis la trezoron plej altprezan,  
La vivon mem.

MAKBETO.

Ĉu vi «la vivon» diris?

LENOKSO.

Vi volas diri lian reĝan Moŝton!

MAKDUFO.

Enpaŝu en la ĉambron por blindigi  
Okulojn viajn per la vid' de nova  
Gorgono: ne demandu la klarigon;  
Vidinte vi ĝin scios. (Makbeto kaj Lenokso foriras.)  
Ho vekiĝu!

Alarme sonorigu. Perfideco!  
Mortigo! Bankvo, Donalben', Malkomo,  
Vekiĝu, dormon tiun ĉi plummolan,  
La nuran figuraĵon de la morto,  
Forĵetu, kaj rigardu morton mem.  
Jen kio vin terure frapos, kiel  
La veno de la tag' de l' lasta juĝo!  
Malkomo, Bankvo, kvazaŭ el la tomboj,  
Leviĝu, kiel senkorpuloj, por  
Vin konformigi al la teruraĵo!



Ho, sonorigu. (Oni sonorigas.)

Venas Ŝia Grafina Moŝto Makbeto.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Kia do okazo  
Pravigas tian bruon trumpetadon,  
Vekintan gedormantojn tie ĉi?  
Parolu!

MAKDUFO.

Ho afabla sinjorino,  
Ne dece estas, ke orelo via  
Ricevu tion, kion mi parolus.  
Novaĵo tia en la ripetado  
Mortigus aŭdantaron.  
(Venas Bankvo.) Bankvo, Bankvo!  
Mortiĝis nia reĝa mastro.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ho!  
Ho ve! ĉi tie?

BANKVO.

Kia kruelaĵo!  
Ho kara Dufo, kontraŭdiru vin,  
Dirante «mi eraris».

Revenas Makbeto kaj Lenokso.

MAKBETO.

Se mi nur antaŭ unu horo estus  
Mortinta, mi min kredus tre feliĉa,  
Ĉar de la nuna tempo ŝajnas, ke  
Nenio seriozan elrigardon  
Prezentas en la ordo de naturo:  
En homa vivo ĉio bagatelojn  
Posedas: velkis gloro kaj beleco:  
La veran vinon de la vivo oni  
Elflui lasis, kaj sub la arkaĵo  
Ĉiela restas nur sennutra feĉo.

Venas Malkomo kaj Donalbeno.

DONALBENO.

Kio malĝusta estas?

MAKBETO.

Vi ne scias!  
La font', la kapo, la fontano mem  
De via sang' ŝtopiĝis.

MAKDUFO.

Via patro  
Mortiĝis.

MALKOMO.

Ho, de kiu?

LENOKSO.

Ŝajne liaj  
Ĉambrogardistoj lin mortigis, kies  
Vizaĝoj, manoj, estis sangŝmiritaj,  
Kun la ponardoj, kiujn neviŝitajn  
Ni trovis sur la kapkusenoj: ili  
Malfermis la okulojn mirigite;  
Nenies vivon ili sciis gardi.

MAKBETO.

Eĉ nun mi pentas malsaĝecon mian,  
Ponardiginte la servistojn.

MAKDUFO.

Kial

Vi tion faris?

MAKBETO.

Kiu povas esti  
Mirplena, saĝa, kolerega, kaj  
Samfoje sintenema? ne, neniu:  
La amo, kiu furioze brulis  
En mia Brust', rapide preterpasis  
Prudenton, haltigilon de l' animo.  
Jen li—Dunkano—kuŝis, lia haŭto  
Arĝentkolora per la ora sango  
Strekita, kaj la tranĉoj elrigardon  
De buŝoj havis, pretaj je l' eniro  
De la ruino: jen la mortigistoj,  
Kolorigitaj laŭ metio sia,  
Ĉiu ponardo ĝis tenil' kovrita  
Per sango: kiu povus sin deteni,  
Havante koron de la am' kapablan,  
Kaj la kuraĝon, kiu tiun amon  
Vidigi povas per agado sia?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ho, helpon! helpon!

MAKDUFO.

Helpu la grafinon.

MALKOMO, en la orelon al Donalbena.

Ĉu ni permesos per silento nia,  
Ke la plimulto kedu, ke ni mem  
Akceptas la rezonojn de Makbeto?

DONALBENO, en la orelon al Malkomo.

Sed ĉu ni tie ĉi parolos, kie  
La sorto, kvazaŭ el kaŝej', elsaltos,  
Kaj nin ekkaptos? For; ne estas tempo  
Indulgi niajn larmojn.

MALKOMO, en la orelon al Donalbena.

Larmojn, kiuj  
Eĉ nun apenaŭ povas sin deteni  
Pro nia kordoloro.

BANKVO.

La grafinon  
Tuj helpu. (Oni forportas Ŝian Moŝton.)  
Kaj, post kiam ni nin estos  
Vestintaj kontraŭ la malvarmo vintra,  
Kunvenu, kaj ĉi tiun monstran faron  
Esploru per persista ekzameno.  
Ni tremas inter timoj kaj suspektoj:  
Sub la protekto Dia jen mi staras,  
Kontraŭstarante la malicintrigojn  
De perfiduloj.

MAKDUFO.

Ankaŭ mi.

ĈIUJ.

Kaj ĉiuj.

MAKBETO.

Ni do surmetu viran pretigecon,  
Kaj poste ĉiuj rekunvenu.

ĈIUJ.

Bone.

Ĉiuj foriras escepte Malkomo kaj Donalbeno.

MALKOMO.

Kion vi faros? Ne kun ili iru:  
Ŝajnigi kordoloron ne sentatan  
Facile estas al la intriganto.  
Foriros mi Anglujon.

DONALBENO.

Mi Irlandon.

Aparte ni pli sendanĝere agos:  
Ĉie tie ĉiuj estas perfiduloj.  
Ju pli intima nia parenceco,  
Al la mortinta reĝo, des pli ili  
Al ni sentigos sian kruelecon.

MALKOMO.

Ĉi tiu sag' mortiga, ĵus pafita,  
Ankoraŭ ne atingis sian celon,  
Kaj ni, la trafon por eviti, sekvos  
La vojon plej senriskan. Al ĉevaloj:  
Ni senceremonie, forpermeson  
Ne demandante, iru: ĉiu devas  
Repagi tion, kion li ricevas.

Ili foriras.

SCENO KVARA

**Sama loko. Ekstere de la kastelo de Makbeto.**

Venas ROSSO kaj MALJUNULO.

MALJUNULO.

Dum sepdek jaroj, kiujn mi memoras,  
Teruraj horoj pasis, kaj strangaĵoj  
Okazis, sed lastnoktaj mirindaĵoj  
Antaŭajn malgrandigis.

ROSSO.

Bona patro,

Vi vidas, ke la tuta ĉielaro  
Minacas, ofendite de la homoj,  
Al la scenejo de la sangverŝado.  
Laŭ la horloĝ' tagiĝas, sed sufokas  
Malluma nokt' la revenantan sunon.  
Ĉu nokto kunaliĝis kun la krimo,  
Aŭ tago pri ĝi hontas, ke la tero,  
Kvazaŭ malviva, tute profundiĝis  
En la mallumo, kiam viva lumo  
Ĉin volas kisi?

MALJUNULO.

Estas nenature,  
Simile al la faritaĵo. Marde,  
Jen falko, per flugiloj etenditaj  
Naĝante malhumile en aero,  
De nura nizo estis atakita,  
Kaj mortigita.

ROSSO.

Ankaŭ la ĉevaloj  
De l' reĝo (ne ekzistas pli perfektaj,  
Rapidaj, belaj)—tio estas stranga  
Sed tute certa—pro sovaĝiĝeco  
Barilojn derompinte forgalopis,  
Malobeemaj, kvazaŭ batalontaj  
Al la homaro.

MALJUNULO.

Jes, kaj oni diras  
Ke ili manĝis unuj la aliajn.

ROSSO.

En vero, kun la senmezura miro  
De mi la rigardinto. Jen alvenas

Venas Makdufo.

Makdufo. Kiel kuras la aferoj,  
Amiko bona?

MAKDUFO.

Ĉu vi ne komprenas?

ROSSO.

Sed kies estas tiu sanga faro?

MAKDUFO.

De tiuj, kiujn ĵus Makbet' mortigis.

ROSSO.

Ho ve! sed kion ili fine celis?

MAKDUFO.

Allogis ilin ia rekompenco.  
La filoj de la reĝo, Donalbeno  
Kaj lia frat' Malkomo sin forŝtelis,  
Kaj malaperis,—kio suspektigas  
Al ili.

ROSSO.

Tio ankaŭ estas kontraŭ  
La voĉo de natur', Ho malŝparema  
Gloramo, kiu volis eĉ engluti  
De via propra viv' la fonton! Do  
Makbet' fariĝos la regnestro?

MAKDUFO.

Certe  
Li estas jam nomita, kaj irinta  
Al Skono por ricevi la honoron  
De reĝarajto.

ROSSO.

Kie de Dunkano  
La korpo estas?

MAKDUFO.

Oni portis ĝin  
Al Kolmakilo, la enterigejo  
Plej sankta, kie liaj antaŭuloj  
Ripozas pace.

ROSSO.

Ĉu vi Skonon iros?

MAKDUFO.

Ne, kuzo, Fifon.

ROSSO.

Tien ankaŭ mi.

MAKDUFO.

Nu, oni faru ĉion bone, Dio  
Protektu, kiel dum antaŭaj tempoj.

ROSSO.

Adiaŭ, patro.

MALJUNULO.

Vin benu Dio kaj la bonfarontojn  
Al mia lando, de homar' zorgantojn.

Ili foriras.

## AKTO TRIA

SCENO UNUA

**Forreso. La palaco.**

Venas BANKVO.

BANKVO.

Vi la zeniton jam atingis: reĝo,  
Kordor', Glamiso, ĉio, laŭ promeso  
De l' sortulinoj, atingita tamen,  
Mi timas, per plej malhonesta ludo:  
Sed viaj posteuloj, oni diris,  
Ne estos heredantoj, sed mi mem  
Fariĝos la radiko kaj naskanto  
De reĝa dinastio. Se de ili  
La vero estas parolebla—kiel,  
Makbeto, via sorto ekzempligas—  
Do kial, laŭ la rolo plenumita  
Pri vi, ne povas ili orakoli  
Pri mia bono nepre esperinda?  
Sed—ĝis konvena horo—mi silentu!

Trumpetado. Venas Makbeto, kiel reĝo; Ŝia grafina Moŝto Makbeto, kiel reĝino, Lenokso, Rosso, Sinjoroj,  
Sinjorinoj, kaj sekvantaro.

MAKBETO.

Jen nia ĉefa gasto.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Se li restus  
Neinvitita, al festeno nia  
Plej grava manko sin sentigus.

MAKBETO.

Nokton  
Ĉi tiun ni festenon reĝan havos,  
Kaj mi ĉeeston vian petas.

BANKVO.

Volu  
Ordoni, via Moŝto, miaj devoj  
Por tio per ligilo nerompebla  
Ligitaj estas.

MAKBETO.

Ĉu vi rajdos baldaŭ?

BANKVO.

Jes, via bona Moŝto.

MAKBETO.

Ni alie  
Dezirus la konsilon vian,—kies  
Graveco helpis al prospero nia  
Ĝis nun—je l' konsiliĝo hodiaŭa;  
Ni do prokrastos ĝin ĝis morgaŭ. Ĉu  
Vi rajdos malproksimen?

BANKVO.

Nu, sufiĉe  
Pasigi la intervenontajn horojn  
De nun ĝis la festeno: se necese,  
Mi devos pruntepreni de la nokto  
Du horojn eble.

MAKBETO.

Tamen ne forgesu  
La feston.

BANKVO.

Ne, neniel, via Moŝto.

MAKBETO.

Ni aŭdis, ke forkuris niaj kuzoj,  
Kulpplenaj, sed ne konfesinte sian  
Patromortigon strangan, pleniginte  
L' orelojn de amikoj renkontitaj  
De strangaj malveraĵoj; sed pri tio  
Ni morgaŭ preparolos, kiam kune  
Ni traktos pri aferoj reĝaregnaj.  
Adiaŭ, al ĉevalo: ĝis revido  
Hodiaŭ nokte. Ĉu vin akompanos  
Fleanc'?

BANKVO.

Jes, via Moŝto: do adiaŭ.

MAKBETO.

Rapidaj kaj nefaletemaj estu  
Ĉevaloj viaj: kaj mi vin al ili  
Konfidas. Ĝis revido.

Bankvo foriras.

Ĉiu homo  
Dezirojn siajn sekvu ĝis la sepa  
Hodiaŭ nokte; ni, por plidolĉigi  
Rerenkontiĝon kun amikoj niaj,  
Ĝis festenhoru restos solaj: Dio  
Vin benu!

Ĉiuj foriras, escepte Makbeto kaj servisto.

Unu vorton: ĉu atendas  
Ordonojn niajn tiuj viroj?

SERVISTO.

Ili  
Ekstere estas de l' palaco.

MAKBETO.

Ilin

Al ni konduku.

La servisto foriras.

La reĝeco estas  
Nenio, se ĝi estus ne senriska.  
Enradikiĝis en spirito mia  
Pri Bankvo mia timo, kaj pro lia  
Grandanimeco estas li timinda:  
Ĉar, kuraĝulo, kun braveco vira  
Kunigas li prudenton, kiu gardas  
Lin de danĝero. Sole lin mi timas:  
Spirito lia ŝajnas superregi  
Spiriton mian, kiel, oni diras,  
Cezara superregis Antonian.  
La sortulinojn li riproĉis (kiam  
Unue ili min salutis reĝo),  
Kun la ordon', ke ili al li ankaŭ  
Parolu: tiam, kiel profetinoj,  
Lin ili ekproklamis antaŭulo  
De reĝa dinastio, donis kronon  
Al mi senfruktodonan, kaj enmetis  
En mian manon senutilan sceptron,  
Nur elŝirotan de principo, kiu  
Ne de mi mem devenis. Tiel, por  
Pranepoj Bankvaj mi per krim' makulis  
Spiriton mian; por idaro lia  
Dunkanon la afablan mi mortigis;  
Mi konspirantojn kontraŭ mia paco  
Starigis nur por ili: kaj eternan  
Juelon mian al la malamiko  
Komuna de homaro mi fordonis,  
Por fari *ilin, la Bankvidojn* reĝoj!  
Ne, preferinde, sorto mem alvoku  
Min kiel batalanton al decido!  
Ho, kiu venas?

Revenas servisto, kun du Mortigistoj.

Iru enirejon,  
Kaj tie nin atendu.

Servisto foriras.

Ĉu hieraŭ  
Ni interparoladis pri l' afero?

UNUA MORTIGISTO.

Jes, via princa Moŝto.

MAKBETO.

Bone, do  
Ĉu vi pripensis miajn argumentojn?  
*Li* estis, kiu dum antaŭaj jaroj  
Fiere vin subpremis, kiun vi  
Supozis esti ni, senkulpaj tute:  
La jenan fakton ĉe kunveno mia  
Mi al vi pruvis, kiamaniere  
Li trompis vin per faroj kaj promesoj,  
Kaj la aŭtorojn de l' rimedoj, kiujn  
Li uzis, mi elmontris, ja sufiĉe  
Eĉ homojn plej malspritajn por konvinki,  
Ke *Bankvo* estas la farinto.

UNUA MORTIGISTO.

Vi

Klarigis ĝin al ni.

MAKBETO.

Kaj nun mi venas  
Al la afero, kiun mi ekcelas  
Per nuna rekunveno. Ĉu vi trovas,  
Ke pacienco tiel superregas  
Naturon vian, ke vi tion ĉi

Konsentas toleradi? Ĉu de longe  
Vi kristaniĝis tiamaniere,  
Ke vi al la Kreinto faros petojn  
Por tiu ĉi *bonul'* kaj liaj idoj,  
De kiu la subpremo al infero  
Vin alpaŝigis, viajn posteulojn  
Farante almozuloj?

UNUA MORTIGISTO.

Mia reĝo,  
Ni estas homoj.

MAKBETO.

Jes, laŭkataloge  
Vi apartenas al la klaso homa,  
Kiel ĉashundoj, leporhundoj, hundoj  
Mikssangaj, mopsoj, dogoj, kaj pudeloj,  
Postflaraj akvohundoj, kaj luphundoj  
Sin ĉiuj nomas ordinare hundoj:  
La takstabelo tamen inter ili  
Rapidajn, malrapidajn, kaj ruzemajn  
Distingas, domgardemajn aŭ ĉasemajn:  
Laŭ la talento, kiun la Naturo  
Kun malŝparema man' al ĉiu donis,  
La hunda list' diferencigas ĉiun,  
Titolon ecan alskribante: tiel  
La homoj estas diferencigeblaj.  
Nu, se vi sur la skalo de vireco  
Ne havas rangon tre malaltan, diru;  
Kaj mi al vi l' ordonon komisios,  
Plenumo kies vian malamikon  
Forigos, kaj al nia ama koro  
Kunforĝos vin, ĉar ni dum lia vivo  
Nin sentas nur malbone, nia sano  
Per lia morto plene restariĝos.

DUA MORTIGISTO.

Mi estas, mia reĝo, viro tiom  
Per la kruelaj battoj de la mondo  
Kolerigita, ke egale estas  
Al mi, laŭ kia maniero mi  
Min venĝos al la mondo.

UNUA MORTIGISTO.

Kaj mi ankaŭ  
Pri malhelpaĵoj tiel laca estas,  
Per sorto distirita, ke mi riskus  
La vivon iel ajn, ĉu mi ĝin perdus  
Aŭ feliĉigus.

MAKBETO.

Nu, vi ambaŭ scias,  
Ke Bankvo estas via malamiko.

AMBAŬ MORTIGISTOJ.

Ni scias, Via Moŝto.

MAKBETO.

Malamiko  
Li estas mia ankaŭ, kaj direktas  
Penadojn siajn kontraŭ interesoj  
Plej karaj miaj, kaj, dum li ekzistas,  
Ne povos mi atingi miajn celojn.  
Kaj, kvankam mi kun frunta senhonteco  
Lin povus forbalai de la tero,  
Respondigante mian reĝan volon,  
Farante tamen tion, mi ofendus  
Amikojn de ni ambaŭ, kies amon



Mi atestimas, kiuj nepre plorus  
La morton de la mortigito: tial  
Mi turnas min al via help', l' aferon  
Kaŝante de l' publika observado  
Pro gravaj argumentoj.

DUA MORTIGISTO.

Kion vi  
Al ni ordonos, tion ni plenumos.

UNUA MORTIGISTO.

Eĉ kvankam niaj vivoj, via moŝto—

MAKBETO.

Okuloj viaj la spiriton viglan  
Vidigas. Mi al vi klarigos baldaŭ,  
En kiu loko vi vin devos kaŝi,  
Kaj la precizan horon de la faro  
Farota iomete malproksime  
De la palaco; ĉar notinde estas,  
Ke mia nomo tie enmiksiĝu  
Neniel; kaj, por ke efektiviĝu  
Senmanke la afero, lia filo  
Fleanco devos ankaŭ partopreni  
En la malhela sort' de sia patro.  
Do interkonsiliĝu; mi revenos.

AMBAŬ MORTIGISTOJ.

Ni jam decidis ĉion, via Moŝto.

MAKBETO.

Mi baldaŭ vin revokos do: eliru.

La mortigistoj foriras.

Finite estas; Bankvo, antaŭ morto  
Preparu vin por la eterna sorto.

Foriras.

SCENO DUA

**La palaco.**

Venas ŜIA GRAFINA MOŜTO MAKBETO kaj SERVISTO.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ĉu Bankvo jam forlasis la kortegon!

SERVISTO.

Jes, Via Moŝto, sed hodiaŭ nokte  
Revenos.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Diru al la reĝo, ke  
Mi, kiam li libera estos, volas  
Paroli iom.

SERVISTO.

Certe, Via Moŝto.

Foriras.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Nenion havas ni, se la akiron  
Kontente ni ne povas ĝui: estas  
Pli bone esti eĉ la mortigitoj,

Ol, mortigintoj, vivi malĝojuloj.

Venas Makbeto.

Ho, kiel via Moŝto ĉiam sola  
Malgajaj kun fantaziaĵoj restas,  
Revivigante pensojn, kiuj devis  
Kun la mortintoj morti. La aferoj  
Nekuraceblaj estas pripensindaj  
Neniel; faritaĵo malfarebla  
Neniam estas.

MAKBETO.

Ni vundis ne mortigis la viperon:  
Ĝi resaniĝos, dum nin maliculojn  
Minacas puno pro maltrafo nia.  
Sed la terglob' diskrevu, l' universo  
Ekfalu, antaŭ ol ni tremegante  
Vivados, kaj dormante suferados  
La agonion de teruraj sonĝoj:  
Pli bone kuŝus ni kun la mortintoj,  
De ni senditaj al eterna paco,  
Por ke ni pace restu, ol tolerus  
Turmentojn de kulpiga konscienco  
En senripoza frenezeco. Kuŝas  
Dunkano en la tombo: post la febra  
Agado de la viv' li bone dormas:  
La perfideco faris sian eblon;  
Nun nek ponardo, nek veneno, fila  
Konspiro, nek armeo malamika, —  
Nenio povas ĝeni lin.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Kuraĝon;  
Lumigu la vizaĝon per ridetoj,  
Ĉar viajn gastojn devos vi gajigi.

MAKBETO.

Mi faros ĝin, edzino mia; ankaŭ  
Vi mem, mi petas; kaj prizorgu Bankvon,  
Lin honorante lange kaj okule  
El ĉiuj niaj gastoj speciale.  
Ĉar ni nin devas fari flatemuloj,  
Maskante la vizagojn por elkaŝi  
La sentojn, kiuj en la koro kovas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ne, kial tiel agi?

MAKBETO.

Ho, edzino  
Tre kara, akraj, kiel la pikiloj  
De la kolubroj, zorgoj min turmentas,  
Dum Bankvo kaj Fleanco vivas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Tamen  
Naturo ne al ili donis rajton  
Eternan de vivado sur la tero.

MAKBETO.

Ni nin konsolu; de atakoj niaj  
Ne povos ili gardi sin; do ĝoju:  
Ĉar antaŭ ol de l' tur' hedervestita  
Elflugos la vesperto, kaj vokite  
De nigra Hekateo la skarabo,  
Portate per flugiloj el armaĵo,  
Zumadon dormallogan sonorigos,  
La famo pri harstariganta krimo  
La mondon skuos.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Kion vi intencas?

MAKBETO.

Ne sciu, karulino, antaŭ kiam  
Aplaŭdos vi la faron. Venu, nokto  
Blindiga, kaj elkovru la afablajn  
Okulojn de la tago kompatema,  
Kaj per la mano, sanga, nevidebla,  
Forigu kaj disŝiru la ligilon,—  
La vivon de la malamata Bankvo,—  
Pro kiu mi tenata estas ĉiam  
En timo! La taglumo ekdensiĝas,  
Kaj la korniko serĉas la nestarbojn,  
Althejm' de sia raŭka kunularo,  
La tagvivuloj lace ekdormetas;  
Kaj noktvagantoj serĉas la ĉasaĵon.  
Vi miras miajn vortojn: trankviliĝu:  
Ĉar komencite la malbona ago  
Per pli malbonaj trafas la sukceson.  
Do kun mi venu.

Ili foriras.

SCENO TRIA

**Parko proksime de la palaco.**

Venas TRI MORTIGISTOJ.

UNUA MORTIGISTO.

Sed kiu sendis vin al mi ĉi tien?

TRIA MORTIGISTO.

Makbeto.

DUA MORTIGISTO.

Ni al li konfidi povas,  
Ĉar li rakontas ĝustajn instrukciojn  
Pri nia farotaĵo.

UNUA MORTIGISTO.

Do nin helpu.  
Ankoraŭ kelkaj strioj de taglumo  
Briletas en la ruĝa okcidento;  
Nun la malfrua vojaĝanto spronas  
Ĉevalon sian, por ke li atingu  
Gastejon, kaj proksimen nun alvenas  
Li, kiun ni atendas.

TRIA MORTIGISTO.

Jen, aŭskultu!  
Mi aŭdas piedfrapojn de ĉevaloj.

BANKVO, Post la scenejo.

Alportu al ni torĉojn, ho!

DUA MORTIGISTO.

Li venas:  
Kaj la ceteraj kune atendataj  
Jam estas en la kort'.

UNUA MORTIGISTO.

Ĉevaloj liaj

Laŭiras la parklimon.

TRIA MORTIGISTO.

Preskaŭ mejlon.  
Sed li kutimas, kiel ankaŭ ĉiuj,  
Al la palaco piediri de  
Ĉi tie.

DUA MORTIGISTO.

Torĉon, torĉon!  
Venas Bankvo kaj Fleanco portante torĉon.

TRIA MORTIGISTO.

Venas li.

UNUA MORTIGISTO.

Atentu.

BANKVO.

Hodiaŭ nokte pluvos.

UNUA MORTIGISTO.

Pluvu do.

Ili atakas Bankvon.

BANKVO.

Ho, perfideco! For, Fleanco, for!  
Vi eble venĝos min. Ho, sklavo?  
Li mortas. Fleanco forkuras.

TRIA MORTIGISTO.

Kiu la torĉon do estingis?

UNUA MORTIGISTO.

Ĉu  
Ne estis tiel aranĝite?

TRIA MORTIGISTO.

Unu  
Nur estas mortigita; ĉar la filo  
Forkuris.

DUA MORTIGISTO.

Ni do nur duonon faris  
De nia tasko.

UNUA MORTIGISTO.

Venu, ni sciigu  
La rezultaton.

Ili foriras.

SCENO KVARA

### **Salono en la palaco.**

Festeno preta. Venas MAKBETO, ŜIA GRAFINA MOŜTO MAKBETO, ROSSO, LENOKSO,  
NOBELOJ kaj ilia sekvantaro.

MAKBETO.

Vi scias la rangordon, do eksidu:

Al ĉiuj korsalutojn.

NOBELOJ.

Korajn dankojn  
Al via reĝa Moŝto.

MAKBETO.

Partoprenos  
Ni vian interparoladon, rolon  
Ludante de humila gastiganto;  
Gastigantino nia sur la reĝa  
Seĝego restos, sed laŭ la okazo  
Ni petos, ke ŝi ankaŭ partoprenu.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Al mia amikaro via moŝto  
Proklamu miajn varmajn bondezirojn.  
Unua Mortigisto aperas ĉe la pordo.

MAKBETO.

Rigardu, ambaŭflanke de la tablo  
Dum ili sidas, mi je ĝia kapo  
Min metas: ĝojo ĉie superfluu:  
Ni baldaŭ trinkos toston ĝeneralan.  
Alproksimiĝante al la pordo.  
Mi vidas sangon sur vizaĝo via.

MORTIGISTO.

La sangon do de Bankvo.

MAKBETO.

Mi certege  
Sur vi pliamas ĝin, ol en la vejnoj  
De Bankvo. Ĉu li estas mortigita?

MORTIGISTO.

Mi, Via Moŝto, tranĉis lian gorĝon.

MAKBETO.

Vi estas do plej lerta gorĝtranĉisto:  
Nek malpli lerta tiu, kiu faris  
La samon por Fleanco; se vi mem,  
Senegalulo estas vi.

MORTIGISTO.

Fleanco  
Forkuris, Via Moŝto.

MAKBETO.

(Flanken.) Do revenas  
Al mia kor' la spasma: mi alie  
Perfekta estus kiel la marmoro;  
Fortika, kvazaŭ sur la fundamento  
De la ŝtoneg', mi ĉirkaŭprenus ĉion  
Egale kun la vasta atmosfero:  
Sed nun mallarĝigita, limigita  
Mi estas, subpremate per petolaj  
Fantaziaĵoj kaj senfinaj timoj.  
Sed Bankvo jam ne vivas?

MORTIGISTO.

Vere, ne:  
Li kuŝas nun en foso, via Moŝto,  
Kun dudek grandaj tranĉoj en la kolo,  
Mortiga eĉ la malplej granda.

MAKBETO.

Dankon.

(Flanken.) Serpento la plenkreska tie kuŝas;  
La serpentido forglitinte naskos  
Post ne tre longa tempo la venenon,  
Sed nun sendenta.—Vi foriru; morgaŭ  
Ni nin revidos.

Mortigisto foriras.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Via reĝa Moŝto,  
Al ni saluto via ofta mankas,  
Sen kiu nia fest' ne diferencas  
De la manĝad' kutima; la gracia  
Ceremonio de akcepto via  
Similas al bongusta saŭc'; alie,  
Al manĝo sendeserta.

MAKBETO.

Ho, mi dankas  
Pro tiu memorigo. (Al la gastoj.) Akompanu  
La bona digestado apetiton,  
Kaj bona san' rezultu!

LENOKSO.

Via Moŝto,  
Eksidi al vi plaĉu.  
La spirito de Bankvo aperas, kaj eksidas  
sur la seĝo rezervita por Makbeto.

MAKBETO.

Honoro la plej alta kronus nian  
Plezuron, se ĉeestus nobla Bankvo;  
Riproĉi kiun pro malzorgo mi  
Preferus, ol kompati pro malbona  
Okazintaĵo!

ROSSO.

Lia neĉeesto  
Promeson lian montras senvalora.  
Al via Moŝto plaĉu nin honori,  
Sidanta kun gastaro via.

MAKBETO.

Restas  
Por mi neniuj seĝoj.

LENOKSO.

Via Moŝto,  
Jen estas seĝo rezervita.

MAKBETO.

Kie?

LENOKSO.

Ĉi tie, via Moŝto. Kio do  
Malhelpas vian reĝan Moŝton?

MAKBETO.

Kiu  
Ĉi tion faris?

NOBELOJ.

Kion, via Moŝto?

MAKBETO.

Ne povas vi certigi, ke la ago  
De mi farita estas: do ne montru  
Al mi sangmakulitajn viajn harojn.

ROSSO.

Leviĝu, gesinjoroj: lia Moŝto  
Malsana estas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Sidadu, geamikoj, lia Moŝto  
Sin sentas ofte tiel: de juneco  
Li havas la malsanon, kaj la spasma  
Ne estos longedaŭra: do sidadu;  
Li resaniĝos post momento: tamen  
Lin rigardante, vi ofendos lin,  
Kaj pligrandigos la malsanon, tial  
Festenu ĝoje. (Al Makbeto.) Ĉu vi estas viro?

MAKBETO.

Jes, multimulo, kiu kun kuraĝo  
Renkontas tion, kion la diablo  
Sen tremo ne rigardus.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Sensencaĵo!  
Jen vera pentro de teruro via,  
Simila je l' ponardo fantazia,  
Kiu,—vi diris,—vin kondukis al  
Dunkano. Ho! l' eksaltoj kaj kapricoj  
De via cerbo, kiuj ne prezentas  
La veran timon, nur rememorigas  
Al mi rakontojn, antaŭ vintra fajro  
Diritajn de maljunulino, kiu  
Ricevis ilin de avino sia.  
Ho, hontu! Kial vi grimacas tiel?  
Kaj tamen nur skabelon vi rigardas!

MAKBETO.

Rigardu, jen, nun kion diras vi?  
(Al la spirito.) Nu, mi ne timas. Se vi povas movi  
La kapon, do parolu: se ostejoj  
Kaj tomboj sendas reen al vivuloj  
Enterigitojn, akcipitroj manĝu  
Mortintojn niajn.

La spirito malaperas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ho, malvirigita  
Pro malsaĝeco!

MAKBETO.

Se,—mi tion ĵuras,—  
Mi staras tie ĉi, mi vidis lin.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Fi, hontu!

MAKBETO.

Sangon en praavaj tempoj  
Laŭvole oni verŝis, antaŭ kiam  
Punleĝoj homaj moderigis morojn  
Sovaĝajn; jes, eĉ poste oni aŭdis  
Rakontojn pri mortigoj, en l' orelon  
Apenaŭ paroleblajn; tiutempe  
Post la senkapigado homoj mortis;

Sed malgraŭ dudek mortoj en la kapo  
La mortigitoj nun sin reprezentas,  
Kaj el skabeloj niaj nin forŝovas:  
Ĉu ne ĉi tio estas plistrangaĵo,  
Ol eĉ mortigo tia!

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Via Moŝto,  
Amikoj viaj karaj vin atendas.

MAKBETO.

Pardonu min, mi petas, mi forgesis.  
Ne mire min rigardu, ho nobeloj;  
Amikoj, mi malsanon strangan havas;  
Al intimuloj miaj tamen tio  
Ne estas rimarkinda. Jen, salutojn,  
Kaj bonan sanon al vi ĉiuj! Mi  
Eksidu. Nun plenigu la pokalojn.  
Mi ĝoje tostos la ĉeestantaron,  
Kaj nian karan Bankvon, sopiratan  
De ĉiuj. Se nur li nun ne forestus!  
Al via san' kaj lia ni soifas.

NOBELOJ.

Laŭ devoj niaj toston reciprokan.

La Spirito revenas.

MAKBETO.

For! de okuloj miaj! enteriĝu!  
Malvarma estas via sango, via  
Ostaro sen medolo; vi ne havas  
Vidpovon en okuloj viaj, kiuj  
Minace ĉirkaŭrulas sin.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Rigardu,  
Nobeloj bonaj, tion ĉi nur kiel  
Aferon ordinaran, ne alie;  
Sed ĝi dum sia daŭro interrompas  
Plezuron nian.

MAKBETO.

Mi viro tion, kion vir' kuraĝa  
Kuraĝos fari, faros.  
Alpaŝu, kiel rusa urs' dikhara,  
Armita rinocero, aŭ la tigro  
Hirkana: prenu formon kian ajn  
Alian, miaj nervoj ne tremetos:  
Aŭ reviviĝu, kaj min ekalvoku  
Al la dezerto vasta, glav' en mano;  
Se timo min ekkaptos min proklamu  
Nur infaneto. For, fantom' terura!  
Falsaĵo vanta, for!

La spirito malaperas.

Ha! tuj post ĝia  
Foriro mi resentas min laŭvire.  
Sidadu, mi vin petas.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

La festenon  
Vi malordigis, tute malaranĝis  
La ĝeneralan ĝojon kun mirego  
De ĉiuj.

MAKBETO.

Ĉu aferoj tiaj povas  
Okazi, kaj, malheliginte niajn



Spiritojn, kvazaŭ nubo de somero,  
Forpasi, sen surprizo nekutima?  
Vi igas min miregi mian propran  
Naturon, kiam vi vidaĵojn tiajn  
Rigardas, ne ŝanĝante la rubenan  
Koloron de la vangoj, dum la miaj  
Pro timo estas blankigitaj.

ROSSO.

Kiajn  
Vidaĵojn, via Moŝto?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ne parolu,  
Mi petas; pli kaj pli li malsaniĝas;  
Demandoj kolerigas lin. Tuj bonan  
Vesperon: ne pripensu pri rangordo,  
Sed tuj foriru.

LENOKSO.

Bonan do vesperon:  
Kaj lia reĝa Moŝto resaniĝu!

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Al ĉiuj bonan nokton mi deziras!  
Ĉiuj foriras escepto Makbeto kaj Grafino Makbeto.

MAKBETO.

Ĝi serĉas sangon: oni diras, sango  
Bezonas sangon: ŝtonoj kelkafoje  
Sin movas, kaj parolas arboj, helpaj  
Al la venĝanto de verŝita sango,  
Antaŭdiristoj, lertaj pri la strangaj  
Interrilatoj inter dubaj signoj,  
Okazintaĵoj, kaj profetaj birdoj,  
Ekzemple, pigoj, korvoj, frugilegoj,  
Eltrovis plej sekretajn postesignojn  
De l' mortigint'. Kioma horo estas?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Neeble diri, ĉu la nokt' finiĝis,  
Aŭ la taglumo venas.

MAKBETO.

Ĉu Makdufo  
Inviton nian reĝan ne akceptis?

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Ĉu vi, sinjoro, sendis ĝin al li?

MAKBETO.

Mi aŭdis onidire, sed mi baldaŭ  
Ĝin certe scios, ĉar en ĉiu domo  
De l' tuta nobelaro mi pagitan  
Serviston havas. Mi vizitos morgaŭ  
Je frua hor' la sortulinojn: ili  
Paroli devos pli al mi, avida  
Ekscii per rimedoj plej malbonaj  
La sorton plej malbonan. Mi devigos  
Al mia celo ĉiujn aĵojn cedi:  
Mi estas jam tra sango trairinta  
Profunde tiel, ke antaŭeniro  
Sin trovas pli facila ol reveno:  
Ideoj strangaj sin al mi prezentas,  
Praktikigotaj neekzamenite.

ŜIA GRAFINA MOŜTO.

Bezonas vi la fortigilon, dormon.

MAKBETO.

Kuŝiĝu ni. La strangaj iluzioj  
Kaj memmalkonfidemo miaj pravas  
La eklernanton en aferoj krimaj.  
Ekzerco faros nin plipraktikuloj.

Ili foriras.

SCENO KVINA

**Erikejo.**

Tondras. Venas la TRI SORĈISTINOJ kaj HEKATEO.

UNUA SORĈISTINO.

Nu, Hekateo, kiel vi koleran  
Mienon havas?

HEKATEO.

Kial ne, malbelulinoj,  
Malĝentilpetolulinoj?  
Kiel vi per babileto  
Vanta traktis kun Makbeto  
Pri aferoj de la sorto,  
Dusencaĵoj, kaj eĉ morto?  
Vi kuraĝis! Dum, mastrino  
Via mi, l' elpensintino  
De malbono, mi ne parton  
Prenis por vidigi l' arton  
Nian gloran! Kaj vi ĉion  
Faris por—atentu tion—  
Iu, kiu ŝanceliĝas  
Ĉiam, kaj ekkoleriĝas,  
Por atingi celojn siajn,  
Ne antaŭenpuŝi viajn.  
Por forigi la eraron,  
Mi renkontos la triaron  
Je la kvina kaj duono  
Ĉe l' kavern' de Aĥerono.  
Dum ruĝiĝas la mateno,  
Mi, atende je l' alveno  
De Makbeto, tie restos,  
Ĝis li ankaŭ mem ĉeestos,  
Ĉar li, tre timante morton,  
Venos scii sian sorton:  
Ĉiujn vazojn do magiajn,  
Kaj sorĉaĵojn fortajn viajn  
Tuj provizu. Pro fatala  
Cel' pasigos mi sub pala  
Lun' la nokton, ĉar la ago  
Antaŭ mezo de la tago  
Estas plenumota; eron  
De vaporo sur la teron  
Ĵus falontan de la luno  
Mi rimarkas: ĝin la suno  
Estos ne fluidiginta,  
Antaŭ ol mi ĝin kaptinta  
Estos: mi per distilado  
Arta, kaj per ensorĉado  
El ĝi formos koboldetojn,  
Kiuj, prezentante petojn  
Al spirito lia, povos  
Lin influi, ĝis li trovos  
Sin en stranga dub' pri ĉio,  
Kaj prizorgos pri nenio;  
Malestimos li la sorton,  
Saĝon, timon, kaj la morton.  
Kaj la hom', plej fortigita

Sin kredante, plej trompita  
Estas. Lia ŝajnfortiko  
Estas nia bonamiko.

Post la scenejo Muziko kun kanto: «Forvenu, forvenu, k.c.»

Aŭskultu: vidu, mia spiriteto  
Atendas min, sidante sur nubeto.

Ŝi foriras.

UNUA SORĈISTINO.

Rapide venu: ŝi revenos baldaŭ.

Ili foriras.

SCENO SESA

### **Foreso. La palaco.**

Venas LENOKSO kaj alia NOBELO.

LENOKSO.

Antaŭaj paroladoj miaj eble  
Esprimis viajn pensojn, kaj klarigis  
Okazintaĵojn strangajn. Jen Makbeto  
Dunkanon la afablan tre kompatis,  
Post lia morto! kaj la brava Bankvo  
Promenis tro malfrue, kiun—diru,  
Se al vi plaĉos—lia fil' mortigis,  
Ĉar li forkuris: homoj ne malfrue  
Promeni devas; kiu ne kondamnas  
La monstrajn agojn de Malkomo kaj  
De Donalbena, kiuj sian patron  
Mortigis? fakto malbenita! kiom  
Da kordoloro al Makbeto ĝi  
Sentigis! ĉu li ne la du krimulojn  
Distranĉis pro kolero pia, kiuj  
La sklavoj de drinkad' neliberuloj  
De dormo estis? ĉu ne estas tio  
Farita noble? Jes, kaj saĝe ankaŭ;  
Ĉar kiu ne ekkoleriĝus, kiam  
Li aŭdas la farintojn de la faro  
Ĝin nei? Do laŭ mi li faris ĉion  
Tre lerte: kaj, mi pensas, se li havus  
En fortikaĵo malliberigitajn  
La filojn de Dunkano,—kio ne  
Okazos dank' al Dio,—ili sentus  
La honton de l' abomeninda ago:  
Fleanco ankaŭ; sed, atentu! ĉar  
Pro klareparolitaj vortoj, ankaŭ  
Pro sia neĉeesto ĉe l' festeno  
De l' uzurpinto, ŝajnas ke Makdufo,  
Laŭ lia ordo, vivas finobelo;  
Ĉu vi, Sinjoro, povas diri, kie  
Li trovas sin?

NOBELO.

La filo de Dunkano,  
De kiu l' uzurpinto nun fortenas  
Reĝrajton lian, iris al la angla  
Kortego de la pia Eduardo,  
Tutkore akceptate; malfeliĉa  
Ekzilo lia ne ekmalbriligas  
Honoron lian: kaj Makdufo tien  
Vojaĝis por demandi ĉu la sankta  
Regnestro volas helpi lin influi  
La Grafon de Nordhumberlando kun  
Sivardo brava, por ke, kun la helpo  
De tiuj,—se la ĉiopova Dio  
Konfirmos ĝin,—ni ree manĝos pace,

Kaj dormos, regalante nin liberajn  
Je sangaj mortigiloj, nian reĝon  
Per amo subtenante, por ricevi  
De li honorojn de la liberuloj:  
Je ĉio ĉi ni nun sopiras; kio  
La uzurpinton tiom kolerigis,  
Ke li militajn preparaĵojn faras,  
Por gardi sian regnon de atako.

LENOKSO.

Ĉu li samtempe sendis al Makdufo  
Inviton?

NOBELO.

Jes, kaj li al la sendito  
Respondis malĝentile, «Mi neniel»  
Malbonhumore la sendito turnis  
Al li la dorson, kantetante, kvazaŭ  
Li dirus, «Ha, vi pentos pri respondo  
Dirita tiel».

LENOKSO.

Tio eble faros,  
Ke li ankoraŭ restos kiel eble  
Plej malproksime de la lando de l'  
Tirano. Dume, preĝu ni, ke sankta  
Anĝelo flugu al la angla reĝo,  
Por lin sciigi pri l' respondo, kiun  
Makdufo sendis, antaŭ ol ĝi venu  
Al la oreloj de Makbeto; tiel  
Rezultos al la subpremata lando  
Bonaĵo dia!

NOBELO.

Mi kun li kunpreĝos.

Ili foriras.

## AKTO KVARA

### SCENO I

**Kaverno. En mezo, kaldrono plena je akvo bolanta. Tondras.**

Venas la TRI SORĈISTINOJ.

UNUA SORĈISTINO.

Trifoje miaŭis la kat' dukolora.

DUA SORĈISTINO.

Kaj la erinaco kvarfoje eklekis.

TRIA SORĈISTINO.

Ekkrias harpio, «Nun estas la horo».

UNUA SORĈISTINO.

Ĉirkaŭ la kaldron' vin metu,  
L' internaĵojn tuj enĵetu  
Venitajn,—rondirante,  
La miksajon kunfarante;—  
Bufon, kiu noktojn tremis  
Tridek-unu, dum ĝin premis  
Peza ŝtono; ĵetu ĝian

Ŝvitvenenon en magian  
Poton; jen l' unua faro  
Inter la ensorĉilaro.

ĈIUJ.

Fabrikilo de malbono,  
Elhejtiĝu la kaldrono;  
Kiel eble plej penadu,  
Bolu akvo, fajr' bruladu.

DUA SORĈISTINO.

De la marĉserpent' tranĉaĵo  
Helpu al kaldronmiksaĵo,  
Piedfingro de la rano,  
Kaj de la vespert' la lano,  
Poste lango de hundido,  
Kaj pikilo de aspido,  
De lacerto la krureto,  
Kaj flugilo de gufeto,  
La infera sup' boladu,  
L' ensorĉil' plifortiĝadu.

ĈIUJ.

Fabrikilo de malbono,  
Elhejtiĝu la kaldrono;  
Kiel eble plej penadu,  
Bolu akvo, fajr' bruladu.

TRIA SORĈISTINO.

Skvam' ŝlimhava de drakego,  
Kaj de lupu la dentego,  
Mum' de sorĉistin' trompema,  
Faŭko de la ŝark' glutema,  
La radik' de malbenita  
Herbo nokte elfosita,  
Malboniga, la hepato  
De hebrea advokato,  
De taksuso tre maljuna  
Ŝelo, kiu, dum la luna  
Mallumiĝ' post lasta fazo,  
Falis teren, ankaŭ nazo  
De sovaĝa Turko faros  
La miksaĵon pli ŝlimplena.  
Ankaŭ tigran internaĵon  
Ĵetu en l' infermiksaĵon.

ĈIUJ.

Fabrikilo de malbono,  
Elhejtiĝu la kaldrono;  
Kiel eble plej penadu,  
Bolu akvo, fajr' bruladu.

DUA SORĈISTINO.

Per mandrila sang' frostigu,  
Por ke vi ĝin plibonigu.

Venas Hekateo.

HEKATEO.

Ho brava! Mi laŭdas penadojn la viajn,  
Kaj vi partoprenos premiojn la miajn:  
Kaj nun la kaldronon vi kunrondirante,  
Simile al elfoj kaj feoj kantante,  
Ensorĉu l' inferan miksaĵon.

Muziko kaj kanto, «Nigraj spiritoj», k. c. Hekateo  
malaperas.

DUA SORĈISTINO.

Pro pikdoloretoj en dikfingro mia  
Mi sentas, ke venas nun malbonaĵ' ia.  
Kiu ajn alproksimiĝu;  
Vi seruroj, malfermiĝu!

Venas Makbeto.

MAKBETO.

Ho vi sekretaj noktomezulinoj!  
Kion vi faras?

ĈIUJ.

Faron ne direblan.

MAKBETO.

Mi petas vin, pro via profesio,  
De kie ajn vi tian antaŭscion  
Akiris, al mi nun respondu: kvankam  
La uragano levos sin, preĝejoj  
Per furioza fort' ruinigante;  
Kaj kvankam la ŝaŭmantaj monstraj ondoj  
Konfuzos kaj englutos la ŝiparon;  
Kaj kvankam nematura gren' disfalos,  
Kaj arboj forbloviĝos; kaj kasteloj,  
Per tondra sago disfenditaj, rompos  
La kapojn de gardistoj siaj; kvankam  
Palacoj kaj la altaj piramidoj  
Ĝis siaj fundamentoj ekskuiĝos,  
Kaj kvankam eĉ la semoj de Naturo  
Fariĝos sendistinge kunmiksitaj,  
Ĝis memdetruo kontraŭ siaj faroj  
Ribelos, al mi klare nun respondu.

UNUA SORĈISTINO.

Parolu.

DUA SORĈISTINO.

Nin demandu.

TRIA SORĈISTINO.

Ni respondos.

UNUA SORĈISTINO.

Sciigu, ĉu vi volas la respondon  
De ni, aŭ niaj mastroj.

MAKBETO.

Voku ilin.

UNUA SORĈISTINO.

Enverŝu sangon de porkino,  
Kiu estas manĝintino  
De naŭ idoj; en la flamon,  
Por pliigi la malamon,  
Ĵetu grason, kiu fluis—  
Dum la pendigilo bruis,  
Tra l' aero svingiĝanta—  
De la mortigint' pendanta...

ĈIUJ.

Ho spiritoj nun alvenu;  
Je l' soleno partoprenu.

Tondras. Unua Aperaĵo: kapo en armaĵo leviĝas.

MAKBETO.

Sciigu al mi, ho vi potenculo

Mistera,—

UNUA SORĈISTINO.

Silentu; ĉar li scias ĉion,  
Kion ajn vi eĉ pensas; do diru nenion.

UNUA APERAĴO.

Makbeto, de l' grafo de Fif' gardu vin,  
Makdufo. Sufiĉas: forpermesu min.

Malleviĝas.

MAKBETO.

Mi dankas, ke vi min antaŭsciigas;  
Suspektojn miajn vi konfirmas: tamen,—

UNUA SORĈISTINO.

Li ne obeos al ordonoj: jen,  
Alia pli potenca ol la lasta.

Tondras. Dua Aperaĵo. Infano sangkovrita leviĝas.

DUA APERAĴO.

Makbeto! Makbeto! Makbeto!

MAKBETO.

Se tri orelojn havus mi, mi aŭdus.

DUA APERAĴO.

Sangama bravul', kun mokema rideto  
La homan potencon rigardu Makbeto,  
Ĉar lin de virino neniu naskita  
Difektos.

Malleviĝas.

MAKBETO.

Makdufo, vivu do: mi vin ne timas.  
Sed mi certigon faros pli certiga,  
Ligante Sorton al promeso ŝia.  
Makdufo, vi ne vivos; tiel mi  
Al miaj timoj diros, «Vi mensogas»,  
Kaj dormos, kiom ajn la tondro bruu.

Tondras. Tria Aperaĵo: Infano kronita leviĝas,  
tenante arbon en la mano.

Ho, kio estas tio, leviĝante,  
Kun la mieno de infano reĝa,  
Portante sur l' infana frunto rondon,  
Montrilon de reĝeco?

ĈIUJ.

Aŭskultu, ne parolu.

TRIA APERAĴO.

Leonkora, ne zorgu, ĉu ekkoleriĝas  
Furioze regatoj, aŭ nokte kaŝiĝas  
La ekkonspirantoj, ĉar militistaro  
Ne venkos Makbeton, ĝis kiam arbaro  
Birnama milite sin movos al li.

Malleviĝas.

MAKBETO.

Ha, neeble; kiu  
L' arbaron povas varbi? elradiki  
La kverkon el la tero? Antaŭsentaj  
Bonaĵoj! Ribeleco, ne leviĝu,  
Ĝis kiam ankaŭ la arbar' Birnama  
Leviĝos, kaj sidante sur la trono

Makbeto fine pagos sian ŝuldon  
Kutiman al Naturo.—Tamen mi  
Korbatojn sentas pri la jeno: diru,  
Se via arto havas la kapablon,  
Ĉu en ĉi tiu lando iam filoj  
De Bankvo reĝos?

ĈIUJ.

Pli ne volu scii.

MAKBETO.

Vi devas kontentigi min: se tion  
Vi ne malkaŝos, malbenaj' eterna  
Vin frapu! Diru,—kial malleviĝas  
Kaldrono via? Kial tiu bruo?

Trumpetado post la scenejo.

UNUA SORĈISTINO.

Vidigu!

DUA SORĈISTINO.

Vidigu!

TRIA SORĈISTINO.

Vidigu!

ĈIUJ.

Ho, vidigu, ho, vidigu:  
La vualon tuj forŝiru,  
Lian koron dolorigu,  
Venu, ombroj, kaj foriru!

Aperas parado de ok Reĝoj, la lasta tenas  
per mano spegulon: sekvas la Fantomo de Bankvo.

MAKBETO.

Vi tro similas la spiriton Bankvan;  
For! Rigardante vian kronon miaj  
Pupiloj turmentiĝas. La hararo  
De l' dua orkronito je l' unua  
Similas, jen, la tria je la dua.  
Abomenindulinoj! Kial tion  
Vidigas vi al mi? Nun kvara! Mi  
Blindiĝu! Ho, ĉu la parad' senfina  
Etendos sin ĝis la renverso tondra  
De l' mondo? Jen alia! nun, la sepa!  
Mi pli ne vidu: tamen oka venas,  
Portante per la man' spegulon, kiu  
Al mi vidigas pli ankoraŭ, kiuj  
Duoblajn globojn kaj trioblajn sceprojn  
Mantenas: teruraj'! Mi nun rekonas  
La veron: ĉar sangmakulita Bankvo  
Per montra fingro kun ridet' fiera  
Almontras ilin kiel siajn. Kio!

La Aperajoj malaperas.

Ĉu tio estas vera?

UNUA SORĈISTINO.

Jes, vera tiu antaŭdiro:  
Sed kial de Makbet' la miro!  
Nun lian koron ni ĝojigu,  
Kaj mirindaĵojn ekvidigu:  
Tra la aero melodia  
Muziko sonu, dum en nia  
Antikva danco ni rondiros:  
Kaj nia glora reĝo diros:  
La ruzaj artoj, kiujn uzis  
La sortulinoj, min amuzis.



MAKBETO.

Do kie estas ili? Foririntaj?  
Ĉi tiu malfeliĉa horo estu  
Plej malbenota en la kalendaro!  
Eniru!

Venas Lenokso.

LENOKSO.

Kion via Moŝto volas?

MAKBETO.

Ĉu vi la sortulinojn vidis?

LENOKSO.

Ne.

MAKBETO.

Ĉu ili ne renkontis vin?

LENOKSO.

Envero,

Ne, via Moŝto.

MAKBETO.

Estu la aero  
Infektodona, kie ili rajdas;  
Kaj malbenitaj estu ĉiuj, kiuj  
Al ili fidas! Mi piedfrapadon  
Ekaŭdis de ĉevaloj: kiuj estis?

LENOKSO.

Nur du aŭ tri, por vin sciigi, ke  
Makdufo rapidiris al Anglujo.

MAKBETO.

Anglujo!

LENOKSO.

Jes, Anglujo, via Moŝto.

MAKBETO.

Ho tempo, vi malhelpas miajn farojn  
Terurajn: cel' rapide elpensita  
Postulas rapidiran plenumadon:  
De tiu ĉi momento miaj pensoj,  
Apenaŭ naskiĝintaj, sian volon  
Efektivigos, kaj eĉ nun, por vesti  
Per faroj miajn pensojn, la kastelon  
Makdufan mi ekkaptos, la graflandon  
Okupos; per la glavo mi mortigos  
Edzinon lian, liajn geinfanojn,  
Kaj ĉiujn, kiuj nomas sin parencoj.  
Mi ne intencas vante fanfaroni;  
Mi tion faros antaŭ malvarmiĝo  
De mia celo. For, vidaĵoj ĉiaj!  
Nu, min konduku tien, kie trovas  
Sin la sinjoroj.

Ĉiuj foriras.

## Fifo. La Kastelo de Makdufo.

Venas GRAFINO MAKDUFO kun sia FILO kaj ROSSO.

GRAFINO MAKDUFO.

Sed kion do li faris, por ke li  
De l' lando rapidiru?

ROSSO.

Pacience  
Atendi oni devas.

GRAFINO MAKDUFO.

Pacienco!  
Sed kie estis lia? Li foriris  
Malsaĝe: se ne agoj niaj, timoj  
Nin ofte faras ŝajne perfiduloj.

ROSSO.

Vi scias ne, ĉu timo aŭ prudento  
Influis lin.

GRAFINO MAKDUFO.

Prudento! La edzinon  
Forlasi, kaj infanojn, kaj kastelon,  
Kaj ĉiujn signojn de la nobeleco,  
En land', de kiu li forkuris! Li  
Ne amas nin: al li la sento mankas  
Natura: ĉar la eta troglodito  
La plej malaltekreska el la birdoj,  
Patrino de idaro en la nesto,  
Kuraĝas kontraŭstari al la strigo.  
En la pezado multe superpezas  
La timo lian amon; kie estis  
Prudento, kiam tiel senracie  
Li forrapidis?

ROSSO.

Ho kuzino mia,  
Sindetenema estu: via edzo,  
Prudenta, saĝa, nobla, bone konas  
La krizojn de la tempoj. Mi ne pli  
Kuraĝas diri, sed kruelaj estas  
Ĉi tiuj tempoj, kiam oni taksas  
Nin, senkulpulojn, kiel perfidantojn;  
Kaj ni la onidirojn akordigas  
Kun niaj timoj, sur sovaĝa maro  
De malcertec' enŝipiĝinte, tien  
Kaj reen moviĝante. Forpermeson  
Mi petas, post ne longe revenonte;  
Aferoj povas ne plimalboniĝi,  
Sed nun atingos baldaŭ la antaŭan  
Nivelon. Ĉiujn miajn bondezirojn,  
Kuzeto bela.

GRAFINO MAKDUFO.

Li senpatra estas  
Kvankam li havas patron.

ROSSO.

Miaj sentoj,  
Se mi pli longe restos, malvirigos  
Min, malhelpante vin, kaj hontigante  
Min mem. Mi tuj foriras.

Li foriras.

GRAFINO MAKDUFO.

Via patro  
Jam mortis. Kiel do vi povos vivi?

FILO.

Mi faros same kiel la birdetoj.

GRAFINO MAKDUFO.

Manĝante vermojn aŭ muŝetojn?

FILO.

Sole  
Per tio, kion mi akiros, kiel  
La birdoj.

GRAFINO MAKDUFO.

Kompatinda birdo, vi  
Neniam timos la kaptilon.

FILO.

Kial  
Mi timos ĝin, patrino? Oni faras  
Kaptilojn ne por la malriĉaj birdoj.  
Sed mia patro ne en vero mortis.

GRAFINO MAKDUFO.

Jes, vere; kiel vi alian gajnos?

FILO.

Ne, kiel vi alian edzon gajnos?

GRAFINO MAKDUFO.

Mi povus cent aĉeti ĉe l' vendejo.

FILO.

Do vi aĉetos ilin por revendo.

GRAFINO MAKDUFO.

Vi havas pli da sprito ol da jaroj.

FILO.

Ĉu mia patro estis perfidulo?

GRAFINO MAKDUFO.

Jes, vere.

FILO.

Kio estas perfidulo?

GRAFINO MAKDUFO.

Tiu, kiu ĵuras kaj mensogas.

FILO.

Ĉu estas ĉiuj, kiuj tion faras, perfiduloj?

GRAFINO MAKDUFO.

Ĉiu, kiu tion faras, estas perfidulo, kaj pendiginda.

FILO.

Ĉu ĉiuj estas pendigindaj, kiuj ĵuras kaj mensogas?

GRAFINO MAKDUFO.

Ĉiuj.

FILO.

Kiu devos pendigi ilin?

GRAFINO MAKDUFO.

La honestuloj.

FILO.

Do la mensoguloj kaj ĵuruloj estas malsaĝuloj, ĉar la mensoguloj kaj ĵuruloj sufiĉas por venki la honestulojn kaj pendigi ilin.

GRAFINO MAKDUFO.

Nu, Dio helpu vin, petoluleto! Sed kion vi faros, por havigi patron?

FILO.

Se li estus mortinta, vi lin plorus, se ne, tio vidigus al mi, ke mi baldaŭ ricevos novan patron.

GRAFINO MAKDUFO.

Babiluleto, kiom vi parolas!

Venas Sendito.

SENDITO.

Saluton, via Moŝto! Vi ne konas  
Min, kvankam mi perfekte scias vian  
Altrangon, sed mi timas, ke danĝero  
Alproksimiĝas vin: se vi konsilon  
De neinstruitulo volas sekvi,  
Ne restu tie ĉi; for, kun la filoj.  
Mi ŝajnas sovaĝul' vin timigante:  
Sed ne antaŭsciigi vin pli estus  
Kruele. Dio vin protektu! Ne  
Kuraĝas mi plu resti.

Li foriras.

GRAFINO MAKDUFO.

Sed kien povas mi foriri? Kion  
Malbonan faris mi? Sed mi memoras,  
Ke sur ĉi tiu ter' malbono ofte  
Laŭdata estas, kelkafoje fari  
Bonaĵojn oni nomas malsaĝeco:  
Do kiel mi virinan senkulpigon  
Pretendas, ke malbonon mi ne faris?

Venas Mortigistoj.

Kiuj estas tiuj ĉi?

UNUA MORTIGISTO.

Kie estas via edzo?

GRAFINO MAKDUFO.

Mi kredas, ne en tia malsanktejo,  
En kiu tia homo, kia vi,  
Lin povos trovi.

UNUA MORTIGISTO.

Li perfida estas.

FILO.

Harega sentaŭgulo, vi mensogas!

UNUA MORTIGISTO.

Kokido, kion?

Frapanto lin por ponardo.

Fiŝid' de perfideco!

FILO.

Mi mortiĝis,  
Patrino: kuru for, mi petas vin!

Li mortas.

Grafino Makdufo foriras, kriegante «Mortigo!» La mortigistoj foriras post ŝi.

SCENO TRIA

**Anglujo. Antaŭ la reĝa palaco.**

Venas MALKOMO kaj MAKDUFO.

MALKOMO.

Ni trovu dezertejon, por ellasi  
La larmojn, kiuj premas niajn brustojn.

MAKDUFO.

Plibone ni mantenu niajn glavojn  
Mortigajn, por defendi la patrujon,  
Kuŝantan sub kalkano de tirano.  
Plivastiĝadas ĉiutage krioj  
De l' buŝoj de vidvinoj kaj de orfoj,  
Frapante la ĉielon, kiu eĥas  
Responde, kunplorante kun Skotlando.

MALKOMO.

Mi ekproklamos ĉie la bezonojn  
De mia lando, laŭokaze ilin  
Plenumos. Tio, kion vi ĵus diris,  
Antaŭenpuŝos eble l' entreprenon  
De ni celatan. Tiun ĉi tiranon  
Abomenindan oni kredis justa  
Antaŭe: vi lin amis, li malbonon  
Al vi ĝis nun ne faris. Mi nur estas  
Junulo; kaj vi eble konsideros,  
Ke saĝe estos min oferi, kiel  
Ŝafidon, por eviti la koleron  
De tiu ĉi demono.

MAKDUFO.

Mi ne estas  
Perfida.

MALKOMO.

Sed Makbeto estas. Foje  
Grandanimulo povus deflankiĝi,  
Por elplenumi reĝan komision.

Sed min pardonu; mi ne povas ŝanĝi  
Naturon vian; la anĝeloj havas  
Brilecon, kvankam la plej brila falis:  
Se eĉ malvirto portus veston helan,  
Mienon sian propran havus virto.

MAKDUFO.

Mi malesperas.

MALKOMO.

Viaj agoj igis  
Min dubi vian viran fidelecon;  
Ĉar kial vi la filon kaj edzinon—  
Ligilojn alteprezajn de la amo—  
Forlasis, ne dirinte adiaŭon?  
Nur miaj timoj, ne suspektoj miaj,  
Vin malhonori ŝajnas—kion ajn  
Mi pensu, eble vi justulo estas.

MAKDUFO.

Sangadu, kompatinda patrolando!  
Starigu, tiraneco, vian bazon,  
Justeco vin ne povas kontraŭstari;  
Ĉar la suferoj de patrujo nia  
Prezentas garantion de titolo  
Al la tirano; nobelul', adiaŭ:  
Mi ne la rolon ludus de l' fripono,  
Al kiu vi aludas, por ricevi  
La tutan havon de la uzurpinto,  
Kun la riĉaĵoj de la oriento.

MALKOMO.

Ne ofendiĝu. Mi ne diris tion  
Pro timo kontraŭ vi. Patrujo nia,  
Ho ve! sub peza jugo subpremiĝas;  
Ĝi ploras, ĝi sangadas, ĉiutage  
La sum' de ĝiaj vundoj pliiĝadas:  
Mi kredas, ke por la subten' de miaj  
Reĝrajtoj amikaro tuj sin levos,  
Ĉar multaj miloj jam de Anglolando  
Promesis sindoneme sian helpon.  
Sed, malgraŭ ĉio, kiam mi la kapon  
De la tirano havos sub piedoj,  
Aŭ portos ĝin je l' pinto de la glavo,  
La kompatinda patroland' enhavos  
Pli da malvirtoj ol antaŭe, pli  
Da suferado pro la malbonaĵoj  
De la reĝonto.

MAKDUFO.

Kia estas li!

MALKOMO.

Min mem pridiras mi, mi, kiu havas  
Enradikitajn tiamaniere  
La malpuraĵojn de malvirto mem,  
Ke, kiam ili estos malkaŝitaj,  
La nigra koro de Makbeto ŝajnos  
Neĝblankan veston porti, kaj regatoj  
Lin taksos kiel ŝafon, en komparo  
Kun la senmezuregaj kruelaĵoj  
De mi, la lupu.

MAKDUFO.

Ne el la legioj  
De la infer' flamanta povas veni  
Diablo pli praktika je malbono,  
Ol mem Makbeto.

MALKOMO.

    Mi lin konas kiel  
Sangaman, avareman, perfidulon,  
Malican, kulpan je la tuta aro  
De pekoj: sed al mia volupteco  
Ne estas lim': edzinoj kaj filinoj,  
Patrinoj kaj fraŭlinoj viaj povus  
Ne kontentigi miajn amdezirojn;  
Kaj ĉiujn malhelpaĵojn, eĉ plej fortajn  
Por kontraŭstari ilin, mi disbatus  
Laŭ mia volo: ja plibone estus  
Ke eĉ Makbet', ol tia, reĝu.

MAKDUFO.

    Vere  
Senlima malĉasteco la naturon  
De tiraneco havas: jam ĝi kaŭzis  
La fruan nenecesan renversiĝon  
De l' tron' de multaj reĝoj. Sed ne timu  
La vian supreniri: ĉar vi povos  
Indulgi en sekreto viajn pekojn,  
Dum vi ŝajnigas rolon de ermito.  
Sufiĉe da virinoj plej cedemaj  
Ni havas; kiuj ĝoje sin dediĉos  
Por plaĉi vian malĉastecon,—kiu  
Similas al vultur' glutama,—kiam  
L' amindamanto estas la reganto.

MALKOMO.

Kun tio en mi kreskas avareco  
Supera, tia ke, se mi fariĝus  
Regnestro, mi forigus la nobelojn,  
Por ke proprigu mi al mi iliajn  
Bienojn; mi de tiu la juvelojn  
Dezirus, de alia la domegon.  
Ju pli mi havus des pli mi sopirus:  
Falsanto, mi per novaj dokumentoj  
Pretendus punojn kontraŭ la justuloj,  
Per konfiskado de la posedaĵoj  
Pliriĉigante min.

MAKDUFO.

    La avareco  
Ol malĉastec' radikon pli profundan  
Prezentas, kiu pasas kun juneco,  
Kaj jam regnestrojn multajn ĝi detruis:  
Ne timu tamen, ĉar Skotlando havas  
Sufiĉe por vin kontentigi: ĉio  
Eltolerebla estas kunigate  
Kun kelkaj bonaj ecoj.

MALKOMO.

    Mi neniajn  
Posedas: tiujn, kiuj plinobligas  
Animon reĝan, kiel la justeco,  
Vereco, modereco, sindoneco,  
Persisto, kompateco, humileco,  
Kuraĝo, pacienc', animforteco,  
Ne ŝatas mi, kontraŭe, al mi plaĉas  
De ĉiu krim' la formojn diversigi  
Multmaniere. Se mi povus, mi  
Preferus la ĉielon kun infero  
Kunmiksi, ĉiujn homojn malpacigi,  
Internacian pacon elforigi.

MAKDUFO.

Skotlando, ho Skotland'!

MALKOMO.

Ĉu tia viro  
Regnestri devus, diru, ĉar mi havas  
Naturon vere tian.

MAKDUFO.

Tia viro  
Ne devus vivi. Ho naci' mizera,  
Kun uzurpinto sangtrepita, kiam  
Feliĉajn tagojn vi revidos, kiam  
La vera heredant' de via trono,  
Kalumniante sian rason, staras  
Memkulpiginto? Via patro estis  
Sanktulo: la reĝin', patrino via,  
Pli ofte sur genuoj ol piedoj,  
Senvivan vivon vivis, diservante.  
Adiaŭ! La rakonto pri vi mem  
Kaj viaj ecoj min ekzilas de  
Skotlando. Mia kor', esperoj viaj  
Ĉi tie mortas!

MALKOMO.

Ho Makdufo, via  
Pasio nobla, de bonec' naskito,  
Elviŝas el animo mia nigrajn  
Suspektojn, min certigas pri honoro  
Kaj fidindeco via. Jam Makbeto  
Penadis per ĉi tiuj allogaĵoj  
Min fari sia, kaj prudento vera  
Malhelpas min tro rapidege agi:  
Sed Dio ĉiopova traktu inter  
Ni ambaŭ! Ĉar ŝip' mia velveturos  
Laŭ via direktilo: mi maldiras  
Kalumniaĵojn miajn ĵus diritajn,  
Kaj neas ilin kiel malveraĵojn:  
Virinon mi neniam malĉastigis;  
Neniam mi ĵurrompis, mi apenaŭ  
Avaris miajn proprajn heredaĵojn;  
Neniam trompis per parolo mia,  
Nek la diablon mem perfidi volus  
Al lia egalulo; al mi plaĉas  
Ne malpli vero, ol la vivo mem.  
Kaj ĉio estis nur kalumniaĵoj  
Kontraŭ mi mem: nun tio, kio vere  
Mi estas, de vi restas disponebla,  
Kaj de patrujo mia kara, kien  
Sivardo, kun dek mil armitoj, iris,  
Ĵus antaŭ ol vi tien ĉi alvenis.  
Nun ni ekiru kune, kaj sukceso  
Respondu al apero nia justa!  
Sed kial vi silentas do?

MAKDUFO.

Diraĵoj,  
Jen plezurigaj al mi kaj jen male  
Samfoje, ŝajnas preskaŭ mirrakontoj.

Venas Kuracisto.

MALKOMO.

Nu, ĝis revido. Ĉu la reĝ' eliros?

KURACISTO.

Sinjoro, jes: nun kompatindularo  
Atendas, por ke li mantuŝu ilin:  
Plej fortaj provoj de la kuracarto  
Iliajn malsanegojn malsukcesis  
Formovi; sed je la mantuŝo reĝa—  
Ĉar Di' sanigan povon al li donis—  
Ekresaniĝos ili.

MALKOMO.



Mi vin dankas.

La kuracisto foriras.

MAKDUFO.

Kiel sin nomas tiu malsanego?

MALKOMO.

Ĝin oni nomas la «malsano reĝa»;  
Mi vidis tie ĉi la bonan reĝon  
Miraklojn fari. Kiamaniere  
De Dio li ĉi tiun povon havas,  
Nur scias li: sed multajn malsanulojn,  
Ŝvelintajn per ulceroj, kompatindajn,  
Pri kiuj malesperis kuracistoj,  
Li resanigas, pendigante ĉirkaŭ  
Iliaj koloj specon da monero,  
Samtempe al la sankta Di' preĝante,  
Kaj oni diras, ke l' heredontaro  
Sinsekve tiun benon kuracartan  
Ricevos. Kun ĉi tio li posedas  
La dian profetarton, kaj per dotoj  
Similaj rimarkindaj de persono  
Kaj de spirito estas li benita.

Venas Rosso.

MAKDUFO.

Rigardu, kiu venas tien ĉi.

MALKOMO.

Sampatrujano mia; sed mi ne  
Lin konas.

MAKDUFO.

Mia kuzo tre afabla,  
Ĝojege mi revidas vin.

MALKOMO.

Mi nun  
Lin konas. Bona Dio laŭokaze  
Finigu nian longan apartiĝon!

ROSSO.

Amen, sinjoro.

MAKDUFO.

Ĉu Skotlando statas  
Kiel antaŭe?

ROSSO.

Kompatinda lando,  
Ho ve! ĝi, sin apenaŭ rekonante,  
Ne povas nomi sin patrujo nia,  
Sed nia tombo; kie nur ridetas  
Pri ĝia malfeliĉo nesciantoj,  
Kaj kie oni ne rimarkas ĝemojn  
Kaj korŝirantajn kriojn, sed singulto  
De kordoloro ŝajnas ordinara  
Eksento, ordinara de mortintoj  
Funebro, kaj bonuloj, kiuj sentas  
En si la ĝojon de la viv', ne scias  
Ĉu morto per perforto aŭ perfido  
Neatendite frapos ilin, antaŭ  
Ol velkos la floretoj, kiujn ili  
Sur siaj ĉapoj portas.

MAKDUFO.

Ho, rakonto  
Preciza, sed tro vera!

MALKOMO.

Ĉiu horo  
Malfeliĉaĵojn novajn gravediĝas.

MAKDUFO.

Kiel edzino mia statas?

ROSSO.

Bone.

MAKDUFO.

Kaj la infanoj?

ROSSO.

Bone ankaŭ.

MAKDUFO.

Do ne  
Maltrankviligis ilin la tirano?

ROSSO.

Trankvilajn tute mi forlasis ilin.

MAKDUFO.

Ne estu vortŝparema, sed parolu.

ROSSO.

Je l' tempo, kiam mi ĉi tien venis,  
Por diri la rakonton kortuŝantan,  
Mi aŭdis, ke arego da bravuloj  
Jam interligis sin ribele—kion  
Al mi konfirmis forte la vidaĵo  
De granda soldataro de l' tirano:  
Nun helpon ni bezonas; via sola  
Ĉeesto en Skotlando amasigus  
Soldatojn, bataligus eĉ virinojn,  
Malfeliĉaĵojn nunajn por eligi.

MALKOMO.

Konsolu ilin per sciigo, ke  
Ni tien iras: ĉar la bona reĝo  
De Angllando al ni komisiis  
Sivardon bravan kun dek mil armitoj,  
Kaj nek pliaĝa ol li, nek pli sperta,  
Soldato estas inter kristanaro.

ROSSO.

Mi volas, ke respondan konsoladon  
Mi povus doni! Sed paroloj miaj  
En la aero de l' dezerto volus  
Kriiĝi, kie ne ekaŭdus ilin  
Orelo homa.

MAKDUFO.

Ĉu rilatas ili  
Al la afero ĝenerala, aŭ  
Privata?

ROSSO.

Ĉiujn honestulojn ili

Koncernas, sed vin ĉefe.

MAKDUFO.

Se min mem,  
Eldiru al mi tuj novaĵon vian.

ROSSO.

Oreloj viaj ne al lango mia  
Malamon sentu, kiu nun aŭdigas  
Al ili la plej malĝojigan sonon  
Elparoleblan.

MAKDUFO.

Hm! mi ĝin divenas.

ROSSO.

Kastelon vian oni ekokupis  
Subite, kaj edzinon vian kaj  
Infanojn oni buĉis kruelege.  
Se mi aldirus la detalojn, tio  
Aldonus ŝajne vian morton ankaŭ  
Al la buĉad' de la gemortigitoj.

MALKOMO.

Ho bona Dio! Sed ne kovru tiel  
Per la ĉapelo, kamarad', la frunton;  
Esprimu buŝe kordoloron, kiu  
Ne parolate pruvas, ke la koro  
Elkrevas.

MAKDUFO.

Ĉu vi diris ankaŭ miajn  
Infanojn?

ROSSO.

Jes, edzinon, kaj infanojn,  
Servistojn, ĉiujn, kiujn oni trovis.

MAKDUFO.

Kaj mi forestis! La edzinon ankaŭ?

ROSSO.

Mi diris.

MALKOMO.

Konsoliĝu: kuracilojn  
Ni faru el ĉi tio, por kuraci  
Per venĝo nia kordoloron nian  
Mortigan.

MAKDUFO.

Li infanojn ne posedas.  
Ho, ĉiujn miajn gekarulojn? Ĉu  
Vi diris, ĉiujn? Akcipitr' infera!  
Ho, tutan mian belan kokidaron  
Kun la patrino, senkompate?

MALKOMO.

Devas  
Vi kiel viro ĝin batali.

MAKDUFO.

Certe

Mi tion faros, sed mi kiel viro  
Ĝin devas senti. Mi ne povas ne  
Memori, ke ĉi tiuj geamatoj  
Ekzistis, al mi pli ol viv' karegaj.  
Ĉu Dio rigardante ne protektis  
La senkulparon? Oni frapis ilin  
Pro vi, Makdufo kulpa, kiu estas  
Nenio; ĉar ne pro iliaj krimoj  
Okazis la buĉado, sed pro miaj.  
Ripozu ili nun en paco!

MALKOMO.

Tio  
Ĉi estu do al vi la akriĝilo  
De via glavo: kordoloro vin  
Ekkolerigu, al vi ne dormigu  
La sentojn, ilin veku.

MAKDUFO.

Ho, mi povus  
Virinan rolon ludi je l' okuloj,  
Kaj venĝon fanfaroni per la lango!  
Sed, kompatema Dio, mallongigu  
La intertempon, kaj vizaĝo kontraŭ  
Vizaĝo tiun ĉi demonon skotan  
Al mi konduku; en la tuja trafo  
De mia glavekbato lin starigu:  
Se li el pun' severa elturniĝos,  
Lin ankaŭ Dio senkulpigu!

MALKOMO.

Bravan  
Arion vi nun kantas. Ni rapidu  
Al reĝ'; soldatoj niaj estas pretaj:  
Ni nur bezonas forpermeson. La  
Rikolto maturiĝas al la manoj  
De ni, de l' ĉiopova Di' la iloj.  
Kuraĝon: ĉar laboron kronas pago:  
Post longa nokto venas fine tago.

Ili foriras.

## AKTO KVINA

### SCENO UNUA

#### **Dunsinano. Vestiblo en la Kastelo.**

Venas DOKTORO DE MEDICINO kaj serva SINJORINO.

DOKTORO.

Mi maldormis kun vi du noktojn, sed mi ne trovis vera vian raporton. Kiam la lastan fojon ŝi somnambulis?

SINJORINO.

De la tempo, kiam lia reĝa Moŝto foriris al la milito, mi vidis ŝin ellitiĝi, surĵeti sur sin la ĉambroveston, malfermi la tirkeston de sia skribtablo, eltiri paperon, faldi ĝin, skribi sur ĝi, legi la skribaĵon, poste ĝin sigeli, kaj reenlitiĝi; sed la tutan tempon profunde dormantan.

DOKTORO.

Vere, jen nenatura tumulto en la homa nervaro, ricevi samfoje la utilon de dormo, kaj efektivigi la farojn de maldormo! Dum tiu dormema ekscitiĝo, krom la somnambulo kaj aliaj aferoj, kion iafoje vi aŭdis ŝin dirantan?

SINJORINO.

Tion, sinjoro, kion mi ne volas raporti.

DOKTORO.

Al mi vi povas, kaj decas, ke vi faru tion.

SINJORINO.

Nek al vi nek al alia, ĉar mi ne havas atestanton, por konfirmi tion, kion mi certigas.

Venas Grafino Makbeto portante kandelon.

Jen, ŝi venas! Ŝi havas la kutiman mienon; kaj, pro mia honoro, somnambulino. Observu ŝin proksime.

DOKTORO.

Kiamaniere ŝi ricevis tiun kandelon?

SINJORINO.

Nu, ĝi staris apude: ŝi ĉiam havas lumaĵon apude, laŭ sia ordono.

DOKTORO.

Vi vidas, ke ŝiaj okuloj estas ne fermitaj.

SINJORINO.

Jes, sed sen vidpovo.

DOKTORO.

Kion ŝi nun faras? Rigardu, kiel ŝi frotas la manojn.

SINJORINO.

Ĝi estas ŝia kutima ago, tiamaniere ŝajnplavi la manojn: mi vidis ŝin tion faradi dum plena kvaronhoro.

GRAFINO MAKBETO.

Jen ankoraŭ makulo.

DOKTORO.

Aŭskultu! Ŝi parolas; mi skribos tion, kion ŝi eldiros, por helpi pli bone mian memoron.

GRAFINO MAKBETO.

For, malbenita makulo! for, mi diras! Unu; du; bone, estas la horo por fari ĝin.—La infero estas malhela! Fi, via Moŝto, fi! Vi, soldato, timplena? Kial ni devus timi, ke tion sciu la tuta mondo, ĉar povas kulpigi nin neniu? Sed, kiu kredus, ke la maljunulo havas tiom da sango en la korpo?

DOKTORO.

Ĉu vi rimarkas tion?

GRAFINO MAKBETO.

La Grafo de Fifo havis edzinon; kie nun ŝi estas? Kio do, ĉu tiuj ĉi manoj neniam estos puraj? Ĉesigu tion, via Moŝto, ĉesigu tion: pro viaj eksaltoj vi difektas ĉion.

DOKTORO.

For, for; vi eksciis tion, kion vi ne devis scii.

SINJORINO.

Estas certe, ke ŝi preparolis tion, kion ŝi ne devis preparoli; nur Dio scias tion, kion ŝi spertis.

GRAFINO MAKBETO.

Jen, ankoraŭ restas laodoro de l' sango: la tuta parfumaro de Arabujo ne povus bonodorigi tiun ĉi maneton. Ho, ho, ho!

DOKTORO.

Kia sopirego! Ŝi havas la koron zorgpremitan.

SINJORINO.

Mi ne volus havi en la brusto tian koron pro kia ajn korpa nobeliĝo.

DOKTORO.

Bone, bone, bone.

SINJORINO.

Dio volu, ke tiel estu, sinjoro.

DOKTORO.

Tiu ĉi malsano estas de mi tute nekuracebla: tamen mi konis kelkajn somnambulintojn, kiuj dece mortis en lito.

GRAFINO MAKBETO.

Lavu la manojn, surmetu la ĉambroveston. Ne paliĝu.—Mi ankoraŭ diras, ke Bankvo enteriĝis: li ne povas eliri el la tombo.

DOKTORO.

Ĉu vere?

GRAFINO MAKBETO.

Al lito, al lito! Oni frapas ĉe la pordego: venu, venu, venu, donu al mi la manon. Faro farita ne estas malfarebla. Al lito, al lito!

Ŝi foriras.

DOKTORO.

Ĉu ŝi nun enlitiĝos?

SINJORINO.

Jes, tuj.

DOKTORO.

Strangaĵojn oni diras: nenaturajn  
Suferojn naskas nenaturaj faroj.  
Spiritoj kulpaj diras la sekretojn  
Al siaj kapkusenoj: ŝi bezonas  
La pastron, pli ol kuraciston. Dio  
Pardonu ĉiujn nin! Pri ŝi atentu;  
De ŝi formovu ĉiujn difektilojn,  
Kaj ŝin prizorgu. Tiel, bonan nokton:  
Ŝi min mirigis, kaj vidadon mian  
Konfuzis. Miajn pensojn mi retenas.

SINJORINO.

Doktoro, bonan nokton.

Ili foriras.

SCENO DUA

### **Kamparo apud Dunsinano.**

Trumpetado antaŭ standardoj. Venas MENTETO, KATNESO, ANGUSO, LENOKSO, kaj SOLDATOJ.

MENTETO.

L' armeo angla nun alproksimiĝas,  
Je la komando de l' reĝid' Malkomo,  
Sivardo lia onklo, kaj Makdufo:  
Flamigas ilin venĝa sangavido,  
Ĉar la insultoj, kaj suferoj gravaj  
De ili subtenitaj eĉ monaĥon  
Al la alarmo sanga, senkompata,  
De la milito pikus.

ANGUSO.

Jes, ni ilin  
Renkontos apud la arbar' Birnama,  
De kie ili venas.

KATNESO.

Kiu scias,  
Ĉu Donalben' kun sia frato venos?

LENOKSO.

Sinjoro, certe ne: mi havas liston  
De l' eminentularo: de Sivardo  
La filo, kaj aliaj senbarbuloj  
De lia fruvireco, kiuj venas  
La provon fari.

MENTETO.

Kion la tirano  
Ekfaras?

KATNESO.

Li fortigas Dunsinanan  
Kastelon. Kelkaj diras, ke li estas  
Freneza; kaj aliaj, kiuj malpli  
Malamas lin, ĝin nomas furioza  
Kuraĝo; sed li siajn partianojn  
Ne povas fari obeemaj.

ANGUSO.

Liaj  
Mortigoj nigraj ligas liajn manojn,  
Ĉar novaj ribelantoj riproĉadas  
Perfidon lian; tiuj, kiuj servas  
Lin, tion faras nur pro la servado,

Kaj ne pro amo: li la reĝan kronon  
Tro peza tro glitema trovas, kiel  
Ŝtelisto malgrandega la mantelon  
De grandegulo.

MENTETO.

Kiu tial povas  
Riproĉi tiun, kiu, disŝirate  
Pro devo al regnestro, kaj teruro  
Al la kruelaj faroj de l' tirano,  
Ekdeflankiĝas por ribeli?

KATNESO.

Ni  
Antaŭen marŝu, por prezenti nin  
Al nia rajta reĝo obeemaj: ĝoje  
La kuraconton de patrujo nia<sup>[1]</sup>  
Malsana ni renkontu, pretaj verŝi  
Sangeron nian lastan, por forigi  
El nia lando la tiranon.

LENOKSO.

Verŝi  
Almenaŭ ĉiom, kiom ĝi bezonos,  
Ke l' floro vivu, kaj la herboj dronu  
Malbonaj. Ĝis Birnamo do ni marŝu.

SCENO TRIA

### **Dunsinano. Salono en la Kastelo.**

Venas MAKBETO, DOKTORO, kaj SEKVANTARO.

MAKBETO.

Ne pli da «onidiroj»: ĉiuj for!  
Ĝis la arbar' Birnama formoviĝos  
Al Dunsinan', mi ne al timo cedos.  
Malkomo, kia estas li! Ĉu ne  
Naskita de virino? La spiritoj,  
Spertuloj pri okazontaĵoj homaj,  
Al mi proklamis: «Timu ne, Makbeto,  
Neniu de virin' naskita povos  
Fariĝi via superanto». Iru,  
Perfidaj grafoj, kaj aligu vin  
Al anglaj manĝeguloj, se vi volas,  
Ĉar mia kor' kaj forto de animo  
Skuiĝos nek per dubo nek per timo.

Venas Servisto.

Vizaĝon vian blankan la diablo  
En nigran ŝanĝu, vi malbravegulo!  
Kial vi tian elrigardon havas  
Anseran?

SERVISTO.

Estas dek mil—

MAKBETO.

Ĉu anseroj,  
Fripono?

SERVISTO.

Militistoj, via Moŝto.

MAKBETO.

Pikigu la vizaĝon, por ruĝigi



Teruron vian, vi blankhepatulo.  
Sed kiaj militistoj, malsaĝulo?  
Animo via mortu! viaj vangoj,  
Pro timo, senkoloraj konsilantoj  
Al timo ŝajnas. Kiaj militistoj,  
Blankulo?

SERVISTO.

La militistaro angla.

MAKBETO.

Vizaĝon vian for de tie ĉi.

Servisto foriras.

Seton'! Pli ol malĝoja mi min sentas,  
Ĉar rigardante—ho, Setono!—Krizo  
La nuna min por ĉiam aŭ starigos  
Aŭ malstarigos. Jam sufiĉe longe  
Mi vivis: mia vivsezono atingas  
L' aŭtunon kun la flava foliaro  
Velkinta, kaj benaĵojn, kiuj devus  
La maljunecon akompani, kiel  
Honoro, amo, obeemo, aroj  
Da geamikoj, mi ne povas havi,  
Sed anstataŭe fortajn malbenaĵojn  
Mallaŭte elspiratajn, buŝlaŭdadon,  
Flatadon, kiujn la mizera koro  
Rifuzi volus, tamen ne kuraĝas.  
Setono!

Venas Setono.

SETONO.

Kion deziras via Moŝto?

MAKBETO.

Kio

Da nova?

SETONO.

Ĉio estas konfirmita.

MAKBETO.

Mi batalados, ĝis de miaj ostoj  
La karno falos dehakita. Donu  
Al mi armaĵon mian.

SETONO.

Ne ankoraŭ

Vi ĝin bezonas.

MAKBETO.

Sed mi ĝin surmetu.

Pli da rajdistoj sendu for, la tutan  
Kamparon por esplori; la timulojn  
Pendigu. Donu al mi la armaĵon.  
Doktoro, kiel la malsanulino  
Nun statas?

DOKTORO.

Ŝi ne havas, via Moŝto,  
Malsanon tiom, kiom korpremantajn  
Fantaziaĵojn, kiuj la ripozon  
Al ŝi malhelpas.

MAKBETO.

Tion do kuracu.

Ĉu vi ne povas al spirit' malsana

Almeti kuracilon, elradiki  
El la memoro korŝirantan zorgon,  
Forigi el la cerbo malĝojaĵojn,  
Kaj per dormiga dolĉa forgesilo  
Eligi el la brusto tiun ŝtofon  
Premigan al la koro?

DOKTORO.

Pri ĉi tio  
La malsanulo devas sin kuraci.

MAKBETO.

Forĵetu drogojn al la hundoj, mi  
Malŝatas ilin. Vestu min per mia  
Armaĵo, donu al mi la bastonon.  
Setono, sendu for; Doktor', la grafoj  
Forlasas min.—Rapidu.—Se vi povus,  
Doktoro, analizi la urinon  
De mia lando, kaj diagnozante  
Eltrovi la malsanon, kiun ĝi  
Suferas, per laksiloj purigante,  
Ĝis kiam ĝi perfekte resaniĝos,  
Mi vin aplaŭdus, ĝis ĉiel' ehante  
Rebatus miajn vortojn. Senvestigu  
Min je l' armaĵo, kia do seneo<sup>[2]</sup>,  
Rabarbo, aŭ laksiga drogo povus  
La anglojn fortimigi el la lando?  
Ĉu vi jam aŭdis pri ilia veno?

DOKTORO.

Jes, via Moŝto; viaj preparigoj  
Sentigas sin.

MAKBETO.

Alportu ĝin post mi<sup>[3]</sup>.  
Ne timos mi pri morto aŭ veneno,  
Ĝis de l' arbar' Birnama la alveno.

DOKTORO. (Flanken).

Se nur de Dunsinano mi forirus,  
Nenia pago reen min altirus.

Ili foriras.

SCENO KVARA

### **Kampero proksime de la Birnama arbaro.**

Tamburado antaŭ standardoj. Venas MALKOMO, maljuna SIVARDO, kaj lia FILO, MAKDUFO,  
MENTETO, KATNESO, ANGUSO, LENOKSO, ROSSO, kaj soldatoj, kiuj marŝas.

MALKOMO.

Ho kuzoj, mi esperas, ke la tagoj  
Alproksimiĝas, kiam ĉiu homo  
Kastelon sian trovos sendanĝera.

MENTETO.

Ni ne ĝin dubas.

SIVARDO.

Kiel oni nomas  
Arbaron tiun?

MENTETO.

La arbar' Birnama.

MALKOMO.

Soldatoj, vi dehaku ĉiu branĉon,  
Kaj antaŭ vi ĝin portu: tiel ni  
Elkaŝos de militistaro nia  
La vicojn, kaj la malamikoj faros  
Malĝustan takson pri ilia nombro.

SOLDATOJ.

Ni tion faros.

SIVARDO.

Oni diris, ke la  
Tirano tromemfida sin fortigas  
En Dunsinano, preta por toleri  
Sieĝon.

MALKOMO.

Jen la ĉefa defendilo  
Por li: ĉar ĉiam, kiam la okazo  
De ribelado sin prezentas, ĉiuj,  
Ĉu altranguloj aŭ aliaj, ĝoje  
Profitas ĝin, neniuj la servadon  
Daŭrigas, krom nur tiuj, kies koroj  
En vero abomenas la aferon.

MAKDUFO.

Ni niajn juĝojn registrigu nur  
Post la okazintaĵo, penadante,  
Laŭ maniero de soldatoj viglaj,  
Ke ni atingu nian celon.

SIVARDO.

Baldaŭ  
La hor' al ni sciigos ĉion, kion  
Ni havas, kion ne—atentu tion.  
Laŭvole pensoj vagu en la kapoj,  
La rezultaton nur decidus frapoj:  
Al kiu la milito paŝu.

Ĉiuj formarŝas.

SCENO KVINA

### **Dunsinano. La internaĵo de la Kastelo.**

Venas MAKBETO, SETONO, kaj SOLDATOJ. Tamburado antaŭ standardoj.

MAKBETO.

Pendigu la standardojn de l' eksteraj  
Muregoj, la ekkrioj timaj bruas  
Senĉese, «Ili venas»: la antikvaj  
Fortikaj bastionoj de ĉi tiu  
Kastel' de sieĝantoj la penadojn  
Mokridos: tie ĉi kuŝadu ili,  
Ĉis malsatego kaj tremfrosta febros  
Konsumos ilin: se ne jam kun ili  
Multegaj el aliĝintaro nia  
Kunigis sin, ni barbo kontraŭ barbo  
Renkontus maltimuloj la friponojn  
Kaj reen batus ilin.

Ekkrioj de virinoj aŭdiĝas post la scenejo.  
Kian bruon

Mi aŭdas?

SETONO.

La ekkriojn, via Moŝto,  
De la virinoj.

Li foriras.

MAKBETO.

Preskaŭ mi forgesas  
La timan senton: estis tempo, kiam  
Nervaro mia nepre glaciigis  
Je l' son' de noktomeza ekkriego,  
Kaj, kvazaŭ vivoplenaj, miaj haroj  
Ekrigidiĝis je rakont' timiga:  
Sed vespermanĝis mi kun teruraĵoj,  
Kun kiuj kutimiĝis miaj pensoj  
Mortigaj loĝi, kaj nenio nun  
Min eksaltigas.

Setono revenas.

Kial tiu krio?

SETONO.

Ĝus mortis la reĝino, via Moŝto.

MAKBETO.

Ŝi devus morti pli malfrue, kiam  
Ni havus tempon por novaĵo tia.  
La temp' senhalte glitas, glitas, glitas,  
Apenaŭ rimarkebla de la homoj,  
Ĝis kiam eĉ la lasta hor' finiĝos,  
Kaj la pasintaj tagoj nur kondukas  
Blindulojn al la tombo. Mallongviva  
Kandelo, estingiĝu! Ĉar la homo  
Promenas kvazaŭ moviĝanta ombro,  
La rolon ludas de aktor' mallerta,  
Sur la scenej' ne longe grimacanta,  
Kaj poste malaperas. Homa vivo  
Nur estas la rakont' de malsaĝulo,  
Freneze sensencaĵojn krieganta  
Sen ritmo kaj sen celo.

Venas Sendito.

Vi venas por paroli; tuj eldiru.

SENDITO.

Apenaŭ povas mi rakonti tion,  
Kion mi vere vidis.

MAKBETO.

Tamen diru.

SENDITO.

Dum mi sur la monteto staris garde,  
Birnamon rigardante, al mi ŝajnis,  
Ke la arbaro sin ekmovas.

MAKBETO.

Sklavo,  
Kaj mensogulo!

SENDITO.

Mi koleron vian  
Toleru, se ne estas vere: de  
Malproksimeco de tri mejloj ĝi  
Videbla estas,—ŝajne, arbareto  
Senhalte moviĝanta.

MAKBETO.

Se vi diras  
Malvere, de la arbo plej proksima  
Pendiĝos vi vivante, ĝis malsato

Velkigos vin: se vere, mi ne plendus,  
Se vi la samon al mi farus. Al mi  
Ekmankas memfideco, mi ekdubas  
La dusencaĵojn de l' diablo, kiu  
Mensogas, kvazaŭ li la veron diras:  
«Ne timu, ĝis al Dunsinano venos  
L' arbar' Birnama»: kaj al Dunsinano  
Alproksimiĝas nun arbaro. Armu  
Vin, armu vin, antaŭen! Se ĉi tio  
Veraĵo estas, nin egalvaloros  
Aŭ resto aŭ foriro. Mi komencas  
Enui eĉ pri l' brilo de la suno,  
Deziri la renverson de la mondo.  
Alarmon sonorigu! Vento, blovu!  
Ruino, venu! kiom ajn ni povu,  
Ni faru tiom, en armaĵ' mortante,  
Kaj brave ĝis la fino batalante.

Ĉiuj foriras.

#### SCENO SESA

### **Dunsinano. Antaŭ la Kastelo.**

Tamburado antaŭ standardoj. Venas MALKOMO, MALJUNA SIVARDO, MAKDUFO kun sia militistaro portanta arbbranĉojn.

MALKOMO.

Sufiĉas: nun deĵetu la foliajn  
Ŝirmilojn, kaj malkaŝu viajn nombrojn.  
Vi, inda onklo, kun la helpo de  
Tre nobla filo via, la atakon  
Kondukos: dum ni kune kun Makdufo  
Laŭ la komand' plenumos niajn devojn.  
Ĉe vi l' afero restas.

SIVARDO.

Bonan ŝancon.  
Se ni hodiaŭ la tiranon trovos,  
Ni velku, se batali ni ne povos.

MAKDUFO.

Elspiru nian bruan trumpetadon,  
De sanga batalmorto minacadon.

Ili foriras.

#### SCENO SEPA

### **Alia parto de la kampo.**

Trumpetado. Venas MAKBETO.

MAKBETO.

Ligite al la fosto, kiel urso,  
Ne povas mi forkuri, sed deviĝas  
Batali. Kiu estas nenaskito  
De la virino? Tian, aŭ neniun,  
Mi timas.

Venas juna Sivardo.

JUNA SIVARDO.

Kiel vi nomas vin?

MAKBETO.

Junul', vi tremos,

Aŭdinte ĝin.

JUNA SIVARDO.

Ne, kvankam vi vin nomus  
Per nomo pli terura, ol infero  
Enhavas.

MAKBETO.

Mi Makbeto nomas min.

JUNA SIVARDO.

La mem diablo povas ne eldiri  
Titolon de mi pli abomenatan.

MAKBETO.

Nek pli timigan.

JUNA SIVARDO.

Vi mensogas, nigra  
Tirano; mi per mia glavo pruvos,  
Ke mensogulo estas vi.

Ili batalas, kaj juna Sivardo falas mortigite.

MAKBETO.

Vi estis  
Naskita de virino, do vi falis.  
Mi ridas je la glavoj manuzitaj  
De homoj naskiĝintaj de virino.

Li foriras. Trumpetado. Venas Makdufo.

MAKDUFO.

Ĉi tie mi la bruon aŭdis. Monstro,  
Malkaŝu vin: se ne per mia mano  
Vi falus, la spiritoj de edzino  
Kaj de infanoj miaj min riproĉus  
Ankoraŭ. Mi ne volas insulanojn  
Batali, kiuj estas nur dungitaj  
Por la milito, sed vin mem, Makbeto;  
Se ne, mi mian glavon eningigos,  
Senmakulitan: laŭ la bruo, kiun  
Mi aŭdas, kredas mi, ke altrangulo  
Proksime marŝas. Sorto, mi lin trovu!  
Kaj mi ne petos pli.

Li foriru. Trumpetado post la scenejo. Venas Malkomo kaj maljuna Sivardo.

SIVARDO.

Ĉi tien, via Moŝto; la kastelon  
Trankvile ekokupis ni; la aroj  
De la tirano, vidu, ambaŭflanke  
Batalas; brava estas la mieno  
De l' grafoj en la batalado: ŝajnas,  
Ke nun ni povas nin gratuli kiel  
Venkintojn, ĉar la fin' alproksimiĝas.

MALKOMO.

Pli de la malamikoj ĉiuhore  
Fariĝas niaj partianoj.

SIVARDO.

Plaĉu  
Al vi eniri la kastelon.

Ili foriras. Trumpetado post la scenejo.

**Alia parto de la kampo.**

Venas MAKBETO.

MAKBETO.

Sed kial ludi rolon de Romano,  
La malsaĝulo, kiu memmortigis,  
Falante sur la pinton de la glavo?  
Dum malamikoj restas, tranĉoj havas  
Sur ili pli agrablan elrigardon.

Venas Makdufo.

MAKDUFO.

Infera hundo, cedu vin!

MAKBETO.

El ĉiuj  
Mi vin evitis; sed retiru vin;  
Animo mia pezan la riproĉon  
Jam sentis pri mortigo de la viaj.

MAKDUFO.

Parolojn mi ne havas: mia glavo  
Enhavas la respondon: for, fripono!  
Sangsoifecon vian por esprimi,  
Paroloj mankus.

Ili batalas.

MAKBETO.

Vane vi klopodas:  
Egale vi l' aeron netranĉeblan  
Impresus per tranĉrando via, kiel  
Vi al mi sangellasis: vian glavon  
Faligu sur vundeblajn kapojn; vivon  
Mi havas ensorĉitan, sin cedontan  
Neniam al naskita de virino.

MAKDUFO.

Forĵetu la esperojn pri l' sorĉaĵo:  
Sciigu la demonon, kiun ĉiam  
Vi servas, ke el la patrina ventro  
Makdufo tromature elŝiriĝis.

MAKBETO.

La lango estu malbenita, kiu  
Al mi proklamis tion, ĉar la parton  
Pli viran de spirito mia ĝi  
Difektis! kaj ĉi tiujn diablinojn  
De nun neniu kredu, kiuj trompas  
Per dusencaĵoj de sorĉart' la homojn,  
Laŭvorte plenumante la promeson,  
Sed kontraŭ tio, kion ni esperas.  
Je vi mi ne batalu.

MAKDUFO.

Do vin cedu,  
Timulo, kaj vivadu, por fariĝi  
Spektaklo plej ridinda de homaro:  
Ni vin pentrigos sur tolaĵo, kiel  
La plej maloftajn monstrojn, subskribita,  
«Jen vidu la tiranon».

MAKBETO.

Ne, neniel  
Mi cedos min, por kisi la teraĵon  
Je la piedoj de Malkomo, aŭdi  
Ekkriojn malbenantajn de l' tumulta  
Popolamaso. Kvankam la Birnama  
Arbaro venis Dunsinanon, malgraŭ  
Ke vi min kontraŭstaras,—vi naskita  
Ne de virino—tamen mian eblon  
Mi provos, protektante mian bruston  
Per mia ŝild'. Makdufo, faru samon,  
Kaj havu la venkit' eternmalamon!

Ili foriras, batalante. Trumpetado.

Retirado. Trumpetado. Venas, inter tamburado kaj standardoj, MALKOMO, MALJUNA SIVARDO, ROSSO,  
la ceteraj GRAFOJ, kaj SOLDATOJ.

MALKOMO.

Al niaj forestantoj mi deziras  
Feliĉan venon.

SIVARDO.

Kelkaj devis fali:  
Sed tiuj, kiuj restas, pruvas nian  
Triumfon aĉetita tre malkare.

MALKOMO.

Makduf' kaj via nobla filo mankas.

ROSSO.

La ŝuldon de soldato via filo  
Jam pagis, via Moŝto: li nur vivis  
Ĝis la printempo de la vira stato;  
Apenaŭ tiun staton li atingis,  
Senŝanceliĝe batalante, kiam  
Li kiel viro mortis.

SIVARDO.

Ĉu li estas  
Mortinta?

ROSSO.

Jes, kaj for de l' kamp' portita.  
Funebro via ne egalvaloru  
Indecon lian: tiamaniere  
Ĝi ne posedus limon.

SIVARDO.

Vundojn antaŭe?

ROSSO.

Vere, sur la brusto.

SIVARDO.

Do li de Dio estu la soldato!  
Se miaj filoj kun la haroj miaj  
Egalenombraj estus, mi dezirus  
Al ĉiu finon tiel noblan: jen  
Pri lia mort' sonorigado mia.

MALKOMO.

Sed pli da funebrado li meritas,  
Kaj mia devo estu ĝin plenumi.

SIVARDO.



Li ne meritas pli: laŭ la rakonto,  
Li ludis inde sian rolon, kiam  
Ĉi tiun terscenejon li forlasis.  
Lin Dio benu! Ne senkonsoleblaj  
Ni restu, ĉar jen venas pli da niaj.  
Revenas Makdufo, portante sur fosto la kapon de Makbeto.

#### MAKDUFO.

Salutojn, reĝo! ĉar vi estas tia.  
Jen, kie staras de la uzurpinto  
La malbenita kapo: ĉiuj estas  
Nun liberuloj: mi vin ĉirkaŭitan  
De l' juvelar' de via regno trovas:  
Mi do iliajn pensojn nur esprimas  
Kaj bondezirojn, laŭte proklamotajn,  
Kriante: «Reĝo de Skotland', salutojn!»  
Trumpetado.

#### ĈIUJ.

Salutojn, Reĝo de Skotlando!

#### MALKOMO.

Ni ne intencas preterlasi multe  
Da tempo, antaŭ ol ni nian konton  
De amo saldos, kun vi kvitiĝante.  
Vi grafoj kaj parencoj miaj, mi  
Plinobeligas vin per la titolo  
De lordoj, la unuaj, kiujn tiel  
Skotland' honoris. Ĉion, kio restas  
Farinda, ni ekfaru kiel eble  
Plej frue, nome, la rehejmigadon  
De ekzilitoj niaj, forkurintaj  
De ruza tiraneco la intrigojn,  
La kulpigadon de la ministraro  
De tiu ĉi buĉist' mortinta kaj  
Reĝino lia diabliniĝinta,  
Memmortiginta, laŭ popola voĉo;  
Kun helpo de la kompatema Dio  
Atentu ni pri tio ĉi, kaj ĉio  
Elplenumota, laŭ la tempo, loko,  
Kaj la okazo de la devalvoko;  
Al ĉiuj dankon, al ĉiu persono  
Inviton al la reĝkronad' en Skono.  
Trumpetado. Ĉiuj foriras.



#### PIEDNOTOJ.

[1] T. e. Malkomo.

[2] Seneo = senna, *séné fr.*

[3] Kompreneble tiu ĉi parolado direktiĝas jen al la doktoro jen al Setono.

\*\*\* END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK MAKBETO \*\*\*

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by

following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

**START: FULL LICENSE**  
**THE FULL PROJECT GUTENBERG LICENSE**  
PLEASE READ THIS BEFORE YOU DISTRIBUTE OR USE THIS WORK

To protect the Project Gutenberg™ mission of promoting the free distribution of electronic works, by using or distributing this work (or any other work associated in any way with the phrase “Project Gutenberg”), you agree to comply with all the terms of the Full Project Gutenberg™ License available with this file or online at [www.gutenberg.org/license](http://www.gutenberg.org/license).

**Section 1. General Terms of Use and Redistributing Project Gutenberg™ electronic works**

1.A. By reading or using any part of this Project Gutenberg™ electronic work, you indicate that you have read, understand, agree to and accept all the terms of this license and intellectual property (trademark/copyright) agreement. If you do not agree to abide by all the terms of this agreement, you must cease using and return or destroy all copies of Project Gutenberg™ electronic works in your possession. If you paid a fee for obtaining a copy of or access to a Project Gutenberg™ electronic work and you do not agree to be bound by the terms of this agreement, you may obtain a refund from the person or entity to whom you paid the fee as set forth in paragraph 1.E.8.

1.B. “Project Gutenberg” is a registered trademark. It may only be used on or associated in any way with an electronic work by people who agree to be bound by the terms of this agreement. There are a few things that you can do with most Project Gutenberg™ electronic works even without complying with the full terms of this agreement. See paragraph 1.C below. There are a lot of things you can do with Project Gutenberg™ electronic works if you follow the terms of this agreement and help preserve free future access to Project Gutenberg™ electronic works. See paragraph 1.E below.

1.C. The Project Gutenberg Literary Archive Foundation (“the Foundation” or PGLAF), owns a compilation copyright in the collection of Project Gutenberg™ electronic works. Nearly all the individual works in the collection are in the public domain in the United States. If an individual work is unprotected by copyright law in the United States and you are located in the United States, we do not claim a right to prevent you from copying, distributing, performing, displaying or creating derivative works based on the work as long as all references to Project Gutenberg are removed. Of course, we hope that you will support the Project Gutenberg™ mission of promoting free access to electronic works by freely sharing Project Gutenberg™ works in compliance with the terms of this agreement for keeping the Project Gutenberg™ name associated with the work. You can easily comply with the terms of this agreement by keeping this work in the same format with its attached full Project Gutenberg™ License when you share it without charge with others.

1.D. The copyright laws of the place where you are located also govern what you can do with this work. Copyright laws in most countries are in a constant state of change. If you are outside the United States, check the laws of your country in addition to the terms of this agreement before downloading, copying, displaying, performing, distributing or creating derivative works based on this work or any other Project Gutenberg™ work. The Foundation makes no representations concerning the copyright status of any work in any country other than the United States.

1.E. Unless you have removed all references to Project Gutenberg:

1.E.1. The following sentence, with active links to, or other immediate access to, the full Project Gutenberg™ License must appear prominently whenever any copy of a Project Gutenberg™ work (any work on which the phrase “Project Gutenberg” appears, or with which the phrase “Project Gutenberg” is associated) is accessed, displayed, performed, viewed, copied or distributed:

This eBook is for the use of anyone anywhere in the United States and most other parts of the world at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org). If you are not located in the United States, you will have to check the laws of the country where you are located before using this eBook.

1.E.2. If an individual Project Gutenberg™ electronic work is derived from texts not protected by U.S. copyright law (does not contain a notice indicating that it is posted with permission of the copyright holder), the work can be copied and distributed to anyone in the United States without paying any fees or charges. If you are redistributing or providing access to a work with the phrase “Project Gutenberg” associated with or appearing on the work, you must comply either with the requirements of paragraphs 1.E.1 through 1.E.7 or obtain permission for the use of the work and the Project Gutenberg™ trademark as set forth in paragraphs 1.E.8 or 1.E.9.

1.E.3. If an individual Project Gutenberg™ electronic work is posted with the permission of the copyright holder, your use and distribution must comply with both paragraphs 1.E.1 through 1.E.7 and any additional terms imposed by the copyright holder. Additional terms will be linked to the Project Gutenberg™ License for all works posted with the permission of the copyright holder found at the beginning of this work.

1.E.4. Do not unlink or detach or remove the full Project Gutenberg™ License terms from this work, or any files containing a part of this work or any other work associated with Project Gutenberg™.

1.E.5. Do not copy, display, perform, distribute or redistribute this electronic work, or any part of this electronic work, without prominently displaying the sentence set forth in paragraph 1.E.1 with active links or immediate access to the full terms of the Project Gutenberg™ License.

1.E.6. You may convert to and distribute this work in any binary, compressed, marked up, nonproprietary or proprietary form, including any word processing or hypertext form. However, if you provide access to or distribute copies of a Project Gutenberg™ work in a format other than “Plain Vanilla ASCII” or other format used in the official version posted on the official Project Gutenberg™ website (www.gutenberg.org), you must, at no additional cost, fee or expense to the user, provide a copy, a means of exporting a copy, or a means of obtaining a copy upon request, of the work in its original “Plain Vanilla ASCII” or other form. Any alternate format must include the full Project Gutenberg™ License as specified in paragraph 1.E.1.

1.E.7. Do not charge a fee for access to, viewing, displaying, performing, copying or distributing any Project Gutenberg™ works unless you comply with paragraph 1.E.8 or 1.E.9.

1.E.8. You may charge a reasonable fee for copies of or providing access to or distributing Project Gutenberg™ electronic works provided that:

- You pay a royalty fee of 20% of the gross profits you derive from the use of Project Gutenberg™ works calculated using the method you already use to calculate your applicable taxes. The fee is owed to the owner of the Project Gutenberg™ trademark, but he has agreed to donate royalties under this paragraph to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation. Royalty payments must be paid within 60 days following each date on which you prepare (or are legally required to prepare) your periodic tax returns. Royalty payments should be clearly marked as such and sent to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation at the address specified in Section 4, “Information about donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation.”
- You provide a full refund of any money paid by a user who notifies you in writing (or by e-mail) within 30 days of receipt that s/he does not agree to the terms of the full Project Gutenberg™ License. You must require such a user to return or destroy all copies of the works possessed in a physical medium and discontinue all use of and all access to other copies of Project Gutenberg™ works.
- You provide, in accordance with paragraph 1.F.3, a full refund of any money paid for a work or a replacement copy, if a defect in the electronic work is discovered and reported to you within 90 days of receipt of the work.
- You comply with all other terms of this agreement for free distribution of Project Gutenberg™ works.

1.E.9. If you wish to charge a fee or distribute a Project Gutenberg™ electronic work or group of works on different terms than are set forth in this agreement, you must obtain permission in writing from the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, the manager of the Project Gutenberg™ trademark. Contact the Foundation as set forth in Section 3 below.

1.F.

1.F.1. Project Gutenberg volunteers and employees expend considerable effort to identify, do copyright research on, transcribe and proofread works not protected by U.S. copyright law in creating the Project Gutenberg™ collection. Despite these efforts, Project Gutenberg™ electronic works, and the medium on which they may be stored, may contain “Defects,” such as, but not limited to, incomplete, inaccurate or corrupt

data, transcription errors, a copyright or other intellectual property infringement, a defective or damaged disk or other medium, a computer virus, or computer codes that damage or cannot be read by your equipment.

1.F.2. LIMITED WARRANTY, DISCLAIMER OF DAMAGES - Except for the "Right of Replacement or Refund" described in paragraph 1.F.3, the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, the owner of the Project Gutenberg™ trademark, and any other party distributing a Project Gutenberg™ electronic work under this agreement, disclaim all liability to you for damages, costs and expenses, including legal fees. YOU AGREE THAT YOU HAVE NO REMEDIES FOR NEGLIGENCE, STRICT LIABILITY, BREACH OF WARRANTY OR BREACH OF CONTRACT EXCEPT THOSE PROVIDED IN PARAGRAPH 1.F.3. YOU AGREE THAT THE FOUNDATION, THE TRADEMARK OWNER, AND ANY DISTRIBUTOR UNDER THIS AGREEMENT WILL NOT BE LIABLE TO YOU FOR ACTUAL, DIRECT, INDIRECT, CONSEQUENTIAL, PUNITIVE OR INCIDENTAL DAMAGES EVEN IF YOU GIVE NOTICE OF THE POSSIBILITY OF SUCH DAMAGE.

1.F.3. LIMITED RIGHT OF REPLACEMENT OR REFUND - If you discover a defect in this electronic work within 90 days of receiving it, you can receive a refund of the money (if any) you paid for it by sending a written explanation to the person you received the work from. If you received the work on a physical medium, you must return the medium with your written explanation. The person or entity that provided you with the defective work may elect to provide a replacement copy in lieu of a refund. If you received the work electronically, the person or entity providing it to you may choose to give you a second opportunity to receive the work electronically in lieu of a refund. If the second copy is also defective, you may demand a refund in writing without further opportunities to fix the problem.

1.F.4. Except for the limited right of replacement or refund set forth in paragraph 1.F.3, this work is provided to you 'AS-IS', WITH NO OTHER WARRANTIES OF ANY KIND, EXPRESS OR IMPLIED, INCLUDING BUT NOT LIMITED TO WARRANTIES OF MERCHANTABILITY OR FITNESS FOR ANY PURPOSE.

1.F.5. Some states do not allow disclaimers of certain implied warranties or the exclusion or limitation of certain types of damages. If any disclaimer or limitation set forth in this agreement violates the law of the state applicable to this agreement, the agreement shall be interpreted to make the maximum disclaimer or limitation permitted by the applicable state law. The invalidity or unenforceability of any provision of this agreement shall not void the remaining provisions.

1.F.6. INDEMNITY - You agree to indemnify and hold the Foundation, the trademark owner, any agent or employee of the Foundation, anyone providing copies of Project Gutenberg™ electronic works in accordance with this agreement, and any volunteers associated with the production, promotion and distribution of Project Gutenberg™ electronic works, harmless from all liability, costs and expenses, including legal fees, that arise directly or indirectly from any of the following which you do or cause to occur: (a) distribution of this or any Project Gutenberg™ work, (b) alteration, modification, or additions or deletions to any Project Gutenberg™ work, and (c) any Defect you cause.

## **Section 2. Information about the Mission of Project Gutenberg™**

Project Gutenberg™ is synonymous with the free distribution of electronic works in formats readable by the widest variety of computers including obsolete, old, middle-aged and new computers. It exists because of the efforts of hundreds of volunteers and donations from people in all walks of life.

Volunteers and financial support to provide volunteers with the assistance they need are critical to reaching Project Gutenberg™'s goals and ensuring that the Project Gutenberg™ collection will remain freely available for generations to come. In 2001, the Project Gutenberg Literary Archive Foundation was created to provide a secure and permanent future for Project Gutenberg™ and future generations. To learn more about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation and how your efforts and donations can help, see Sections 3 and 4 and the Foundation information page at [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org).

## **Section 3. Information about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation**

The Project Gutenberg Literary Archive Foundation is a non-profit 501(c)(3) educational corporation organized under the laws of the state of Mississippi and granted tax exempt status by the Internal Revenue Service. The Foundation's EIN or federal tax identification number is 64-6221541. Contributions to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation are tax deductible to the full extent permitted by U.S. federal laws and your state's laws.

The Foundation's business office is located at 809 North 1500 West, Salt Lake City, UT

84116, (801) 596-1887. Email contact links and up to date contact information can be found at the Foundation's website and official page at [www.gutenberg.org/contact](http://www.gutenberg.org/contact)

#### **Section 4. Information about Donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation**

Project Gutenberg™ depends upon and cannot survive without widespread public support and donations to carry out its mission of increasing the number of public domain and licensed works that can be freely distributed in machine-readable form accessible by the widest array of equipment including outdated equipment. Many small donations (\$1 to \$5,000) are particularly important to maintaining tax exempt status with the IRS.

The Foundation is committed to complying with the laws regulating charities and charitable donations in all 50 states of the United States. Compliance requirements are not uniform and it takes a considerable effort, much paperwork and many fees to meet and keep up with these requirements. We do not solicit donations in locations where we have not received written confirmation of compliance. To SEND DONATIONS or determine the status of compliance for any particular state visit [www.gutenberg.org/donate](http://www.gutenberg.org/donate).

While we cannot and do not solicit contributions from states where we have not met the solicitation requirements, we know of no prohibition against accepting unsolicited donations from donors in such states who approach us with offers to donate.

International donations are gratefully accepted, but we cannot make any statements concerning tax treatment of donations received from outside the United States. U.S. laws alone swamp our small staff.

Please check the Project Gutenberg web pages for current donation methods and addresses. Donations are accepted in a number of other ways including checks, online payments and credit card donations. To donate, please visit: [www.gutenberg.org/donate](http://www.gutenberg.org/donate)

#### **Section 5. General Information About Project Gutenberg™ electronic works**

Professor Michael S. Hart was the originator of the Project Gutenberg™ concept of a library of electronic works that could be freely shared with anyone. For forty years, he produced and distributed Project Gutenberg™ eBooks with only a loose network of volunteer support.

Project Gutenberg™ eBooks are often created from several printed editions, all of which are confirmed as not protected by copyright in the U.S. unless a copyright notice is included. Thus, we do not necessarily keep eBooks in compliance with any particular paper edition.

Most people start at our website which has the main PG search facility: [www.gutenberg.org](http://www.gutenberg.org).

This website includes information about Project Gutenberg™, including how to make donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, how to help produce our new eBooks, and how to subscribe to our email newsletter to hear about new eBooks.